

ESPERANTO

REVUO INTERNACIA



Inaŭguro de la 44-a Universala Kongreso en Varsovio.

N-ro 646 (9)
Septembro 1959



Lamenhof-Jaro

**Universala
Esperanto-Asocio**

**(En Konsultaj Rilatoj kun
U.N.E.S.C.O.)**

esperanto

SEPTEMBRO 1959

5 2 a J A R O

REVUO INTERNACIA

N-RO 646 (9)

Fondinto : H. HODLER

Honora Redaktoro : HANS JAKOB

Ĉion por la redakcio oni sendu al la Redaktorino :
S-ino Kirsten Zacho, Randbølvej 4, København, Danlando.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto
(abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA
ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-2,
Nederlando. Telefono : Rotterdam 128313. Ĝirkonto : 378964
TELEGRAMADRESO : ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive
la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ
la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A. :

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj,
kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaron
al nia redakcio.

Jara abono (1959) : 9,50 n.gld. (kun membreco kaj jarlibro
12,50 n.gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 120,— gld $\frac{1}{2}$ paĝo 64,— gld $\frac{1}{4}$ paĝo 32,— gld
 $\frac{1}{8}$ paĝo 16,— gld $\frac{1}{16}$ paĝo 8,— gld

Anoncetoj pri korespondado :

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu
duo da vortoj.

Legantoj en 80 landoj.

Estraro de U.E.A. :

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chiabrera 37,
Torino.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere
Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road,
London E 11, Britujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri financoj, 5 Quai Vauban,
Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

D-ro Ing. Giordano Azzi, estrarano pri kulturaj aferoj,
viale Giulio Cesare 20, Como, Italujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj,
Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo,
Telefono : ARNold 90-81.

Serva Centro, Palais Wilson Genève. Svislando.

Honora Administranto : Hans Jakob. Telef. 32.30.34.

Enhavo

La plej emocia Kongreso	141
Frostavallen kontribuis	158
Precizigo rilate Deklaracion de SAT	158

Rubrikoj :

La Internaciaj Konkursoj 1959	158
La poŝtmarkkolektado	158
Radio	159
Oficiala Informilo	159

Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la
redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare
tajpitaj en perfekta Esperanto. Oni skribu sur nur
unu flanko de la papero (prefere en normformato
A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa margeno
maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto.
Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn super-
signojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn
manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko
aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

La plej Emocia Universala Kongreso

Varsovio! Unika evento en la historio de Esperanto! Ĉu pro la nombro de 3300 kongresanoj el 45 landoj, ĉu pro la impona kongresejo? Ne, en tiu ĉi kazo gravas ne la kvanto nek la kadro, kvankam ambaŭ, kiel eksteraj signoj, konvene aldoniĝis al la graveco de la evento kaj tiel ĝia signifo estis pli forte emfazita. Estas ĝojige, ke la kongreso, kunvokita en la ĉefurbo de la lando, kiu donis al la homaro la genion de d-ro L. L. Zamenhof, okaze de la centjara datreveno de lia naskiĝo, estis tiel impona laŭnombro — la plej granda Universala Kongreso de post la jaro 1924 — kaj povis okazi en la mondfama Granda Palaco de Kulturo kaj Scienco en Varsovio.

La 44-a Universala Kongreso estis unika pro la omaĝoj faritaj al la memoro de la aŭtoro de la Internacia Lingvo ekde la inaŭgura kunsido ĝis la ferma kunveno, sed precipe en la tago dediĉita plene al d-ro Zamenhof. La defilado preter la tombo de Zamenhof, la malkovro de la memortabulo en la Strato Zamenhof en Varsovio kaj la vizito al lia naskiĝurbo Bjalistoko estas eventoj, kiuj neniam forviŝiĝos el la memoro. Dum tiuj aranĝoj ni vere sentis la etoson de la estiĝo de Esperanto. La tuta vivo kaj laboro de Zamenhof ekhavis por ni pli profundan signifon, kiam ni ekvidis lian naskiĝdomon, la lokojn, kie li laboris, kaj la tombon de la aŭtoro de la Internacia Lingvo.

Kaj kiel bonvenigis nin la hodiaŭa Pollando? Ĉu ĝi komprenas la signifon de Zamenhof por la tuta homaro?

Ĉe la malkovro de la memortabulo en la Strato Zamenhof la prezidanto de la Urba Konsilantaro de Varsovio, Wład. Wit. Szychalski, diris interalie: "...En tiu ĉi nova tempo, en tiu ĉi nova Varsovio, ni dankeme revenas al la plej brilaj paĝoj de ĝia historio. Restis la strato de Zamenhof: sur la ruinoj de domo, en kiu li vivis kaj laboris, elkreskis nova domo, kaj ĉi tiun lokon ni memorigas per tabulo, kiu devas lernigi la preterpasanton paroli al la sekvantaj generacioj, ke ĉi tie naskiĝis tiel grandioza homo plena de humanisma penso; ke homoj de la tuta mondo devas nepre trovi unu komunan lingvon de interkompreno; ke post la kompreno venos amikeco, post la amikeco la paco — kaj kun la paco la feliĉo de la homaro".

La vortoj de s-ro Piotr Jaroszewicz, kiu parolis en la nomo de la Registaro de la Pola Popola Respubliko, ne estis malpli varmaj. "Ni ĝojas — li diris dum la solena Inaŭguro — ke ni gastigas tiom da adeptoj de la noblaj ideoj de paco, de proksimiĝo kaj kunlaboro internacia, batalantaj por tio, ke neniam plu la mondo fariĝu areno de detruaj militoj...".

Multajn belajn vortojn diris la Ministro al la

esperantistoj kaj multon faris la Ŝtato por ĉiurilate sukcesigi la Kongreson kaj por helpi la Komitaton de UEA kaj la aliajn instancojn de la movado en ilia laboro dum la kongreso. Krom la alta subvencio, al la LKK estis metitaj je dispono dum la kongresa semajno kelkaj aŭtomobiloj. Honora Protektanto de la Kongreso estis Józef Cyrankiewicz, Ministro-Prezidanto de la Pola Popola Respubliko. Pli signo de respekto al la kongreso en la Jubilea Jaro!

Dum la Jubilea Kongreso oni multe laboris sur ĉiuj kampoj. Speciale intensa estis la agado de la Komitato kaj Estraro dum la tuta semajno. Oni faris multajn utilajn decidojn kaj ankaŭ akceptis kelkajn rezoluciojn. Horon post horo okazadis kunvenoj kaj kunsidoj en diversaj lokoj, dum en la sama tempo la aliaj kongresanoj ĝuis diversajn artajn aranĝojn kaj kulturajn manifestaciojn, kiel ekzemple teatraĵojn, baletojn, filmojn, diversajn konkursojn ktp. Multaj aranĝoj devis okazi samtempe pro la tro ŝarĝita programo, tiel ke bedaŭrinde oni ne povis ĉeesti multon, kion oni fakte estus dezirinta aŭdi aŭ vidi.

La lastan vesperon antaŭ la finiĝo de la kongreso la Pola Registaro gastigis ĉiujn kongresanojn kaj lukse regalis ilin. Tie troviĝis homoj de diversaj landoj, kun malsamaj lingvoj, mond-rigardoj, religioj kaj interparolis amike unu kun la alia post unusemajna kunestado. Estas certe, ke la personaj kontaktoj dum la kongreso — precipe dum tia kongreso plena de emociigaj momentoj — kreas multe pli da reciprokaj komprenemo kaj simpatio ol eĉ la plej longdaŭra korespondado. La Jubilea Kongreso, okazinta en loko tiel intime ligita al la krea laboro de la aŭtoro de Esperanto, de la unua poeto, unua verkisto, unua tradukanto kaj unua oratoro en la nova lingvo, estis sendube profunde inspira por ĉiuj, kiuj amas Esperanton, laboras por ĝia plua disvastigo kaj ligas tiun laboron kun la idealoj de amikeco inter la popoloj kaj paco en la mondo.

Laŭ la programo, ellaborita de la IOK por la Zamenhof-jaro, la kongreso en Varsovio devis esti la unua kulmina punkto. Tia ĝi efektive estis. Nun ĉiuj Esperanto-organizaĵoj, precipe la landaj asocioj kaj lokaj grupoj, streĉu ĝis maksimumo siajn fortojn, por ke ĉie la kultura mondo digne memorigu la centjaran datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof en la sekvantaj monatoj, tiel ke la dua kulmina punkto, la 15-a de decembro 1959, estu same altnivele festata ĉie en la mondo.

La plej emocia kongreso estas for. La kolektitaj emocioj nun transformiĝu en novan energion por plia racia laboro por la Internacia Lingvo.

Kirsten Zacho

La Solena Inaŭguro

En la belega kongresa salonego en la Kulturpalaco okazis la Inaŭguro de la 44-a Universala Kongreso de Esperanto. La salono estis plenplena, kiam la solenaĵo komenciĝis per muziko de la Simfonia Orkestro de Pola Radio en Varsovio sub la direktado de *Stefan Rachoń*: La Solena Preludo de Seber.

La prezidanto de LKK, *Andreo Rajski*, bonvenigis la 3250 kongresanojn alvenintajn el ĉiuj partoj de la mondo. 43 nacioj estas reprezentataj ĉi tie, diris s-ro Rajski, kaj multaj homoj, vojaĝis milojn da kilometroj por partopreni nian kongreson.

Tio montras, ke nia forto estas io pli ol emo interparoli en internacia lingvo, kaj ni sentas ĝin en ĉiu Esperanta Kongreso kiel potencon flugilsvingon de grandioza ideo leviĝanta super ĉiuj naciaj, rasaj, religiaj, politikaj kaj sociordaj diferencoj. Ni ne estas la solaj, kiuj laboras por tiaj ideoj, sed ni estas la solaj, kiuj havas la materialan rimedon por praktike realigi ilin — pere de la mirinda ilo Esperanto.

Bonveniga parolado de la Pola Vic-Ĉefministro *PIOTR JAROSZEWICZ*: "Estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj! En la nomo de la Pola Popola Respubliko mi bonvenigas la partoprenantojn de la 44-a Universala Kongreso de Esperanto. Bonvenigas vin ankaŭ, karaj gastoj, nia tuta socio, kaj speciale ĝojas pro via veno la loĝantoj de nia ĉefurbo — Varsovio.

Mi deziras al vi fruktodonajn debatojn kaj sukcesojn en via laboro. La fakto mem, ke en la Kongreso partoprenas pli ol tri mil delegitoj el 43 landoj de la tuta mondo montras, ke la internacia lingvo Esperanto estas pli kaj pli vaste agnoskata, pli kaj pli populara en ĉiuj partoj de la mondo. Ne estas sen kaŭzo, ke la ideoj de la Esperanto-Movado estas subtenataj de la pola registaro. Ili estas ideoj, kiuj celas ligi homojn de diversaj nacioj, de diversaj politikaj konceptoj kaj religioj, faciligi al ili la interkomprenon. La pola registaro daŭre strebas al kunlaboro inter ĉiuj nacioj, sendepende de ilia sociordo, vivmaniero aŭ raso. Ni obstine kaj konsekvence celas al tio, ke la popoloj interkompreniĝu, ke ili aprezu reciproke siajn kulturajn valorojn kaj materialajn akiraĵojn, ke per siaj laboro kaj batalo ili elforĝu pli bonan

morgaŭon por si kaj por la tuta homaro. La pola nacio subtenas tiujn ideojn kaj movadojn, kies fakta celo estas la forigo de malhelpoj sur la vojo al reciproka estimo kaj kunlaboro. Ĝuste al tiuj idealoj servas la internacia Esperanta movado. Kiel poloj ni duoble ĝojas pri la sukcesoj de Esperanto, ĉar ĝi estas kreita en Pollando, kaj tie ĉi ĝi komencis batali por sia vivraĵto.

En nia patrujo, apud la kreinto de Esperanto d-ro Ludoviko Zamenhof, kies centjaran datrevenon de la naskiĝo ni solene festas en la nuna jaro, multaj poloj, inter ili ankaŭ elstaraj sciencistoj, disvastigis la ideon de d-ro Zamenhof, kiel ekz. Odo Bujvid, eminenta pola bakteriologo, kunlaboranto de la malkovrinto de la tuberkuloza bakterio, d-ro Koch, kaj kiel Jan Ignacy Baudouin de Courtenay, kiu starigis la teorion de internacia lingvo. Pollando estas la lulilo de la Esperanta poezio, kies kreintoj estas: Zamenhof, Grabowski — la tradukinto de "Sinjoro Tadeo", Tuwin — la tradukinto de Slowacki kaj multaj aliaj. Pollando sincere kaj kun simpatio bonvenigas ĉiujn kongresanojn en sia ĉefurbo, ruinigita antaŭ 15 jaroj, sed hodiaŭ rekonstruata per heroa fortostreĉo de la tuta nacio kaj pli bela ol iam ajn. Ni ĝojas, ke ni gastigas tiom da adeptoj de la noblaj ideoj de paco, de proksimiĝo kaj kunlaboro internacia, batalantaj por ke neniam plu la mondo fariĝu la areno de detruaj militoj.



Parto de la Kongresa Salonego dum la Inaŭguro.

Ni petas, ke vi sentu vin ĉe ni kiel eble plej bone, kaj, karaj kongresanoj, sentu vin hejme en Pollando.”

Prof. d-ro Giorgio Canuto, prezidanto de U.E.A., bonvenigis ĉiujn kongresanojn kaj dankis al s-ro vic-ĉefministro Jaroszewicz pro la donado de bonaj kongresmedioj. Prof. Canuto omaĝe rememorigis la grandajn filojn de Pollando, sciencistojn kaj verkistojn, akcentis la polajn liberectradiciojn, la polan tragikon kaj la polan gloron. Plue, li komparis la situacion kun tiu de la antaŭa Varsovia Kongreso, en 1937, kiam, same, okazis solenaĵoj ĉe historiaj lokoj. Fine, Prof. Canuto esprimis sian ĝojon pri la okazigo de la Universala Kongreso en la Jubilea Zamenhof-Jaro en Varsovio, la urbo kie Zamenhof pasigis la plej grandan parton de sia vivo.

Sekvis salutoj de registaraj reprezentantoj de: *Belgujo, Finnlando, Francujo, Germana Federacia*

Respubliko, Nederlando, Brazilo, Indonezio, Norvegujo kaj Svedujo. De landaj asocioj aliĝintaj al U.E.A. salutis: *Argentino, Aŭstrio, Belgujo, Brazilo, Britujo, Bulgarujo, Danujo, Finnlando, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Italujo, Japanujo, Jugoslavio, Maroko, Monako, Nederlando, Norvegujo, Novzelando, Polujo, Svedujo, Svisujo kaj Norda Ameriko.* Salutoj de landaj asocioj nealiĝintaj al U.E.A.: *Ĉeĥoslovakio, Ĉinujo, Hungarujo, Izraelo, Meksikio, Kanado, Rumanujo kaj Unuigita Araba Respubliko.* Sekvis saluto de la *Infana Kongreseto* okazanta samtempe en Varsovio.

La *Simfonia Orkestro de Pola Radio en Varsovio* ludis la polan dancon Mazurkon el la opero "La fantoma nobelbieno" de la pola komponisto Stanisław Moniuszko, kaj nun sekvis la festparolado de s-ro Ivo Rotkvič. La orkestro finis la Solenan Inaŭguron per ludado de la himno.

Festparolado omaĝe al D-ro Zamenhof

de Ivo Rotkvič

Komence de sia festparolado s-ro Ivo Rotkvič direktis salute siajn vortojn al Pollando kaj al ĝia popolo, kiu sur la longaj vojoj de sia historio verŝis sian sangon por la libereco, sed kiu ankaŭ donis al la homaro multajn geniojn, inter kiuj tiujn de Chopin kaj Kopernik. En la daŭrigo de sia parolado la oratoro, plurfoje interrompita per viglaj aplaŭdoj, interalie diris:

"Nu, ĉe la mencio pri la titano Kopernik, mia penso spontanee transglitas laŭ aliaj ĉeneroj de la longa rozario el la mondfamaj polaj geniuloj kaj superflugante tri jarcentojn plue ekripozas ĉe la lulilo, kiun en la jaro 1859 piedbalancis la feliĉa patrino en la ligna dometo de malriĉula kvartalo en Bjalistoko. El tiu ĉi lulilo eliros tridek jarojn poste ankaŭ revolucio de la homa penso por detronigi la privilegian mondcentran pozicion de — egale kiu — nacio sur la lingva kampo. Ŝajne, la atmosfero de Pollando estis ĉiam tre favora por la mondskalaj ideoj".

"Zamenhof naskiĝis en la regiono, kiun, dank'al Esperanto, ĉiu el vi konas laŭ la senmortaj versoj de Mickiewicz. En tiuj ravaj pejzaĝoj, kiuj tiriĝas nemalproksime de la lazura Njemen, la juna Ludoviko ĉerpis siajn unuajn impresojn kaj lia spirito alkutimiĝis al la vasteco de senlimaj horizontoj. Sendube li ofte kun petolaj kamaradoj plektis la brakojn ĉene kaj kudris sian vojon dekstren — maldekstren sur kampoj kun la dolĉa ŝusuro de tritiko, preter fruktoĝardenoj kaj insidaj urtikoj, tra vojfosoj, kie silkaj ŝafidoj sur longaj, rompeblaj kruroj, trankvile pinĉis herbon".

"Kaj tiu sereno de l'aĝo infana neniam plu povos viŝiĝi el la retino de Zamenhof. Iam poste ĝi erupcios en la neforgeseblajn vortojn de unu el liaj plej belaj paroladoj: "Vi staras nun antaŭ miaj

okuloj, mia kara Litovujo, mia malfeliĉa patrujo, vi, kiun ofte mi vidas en miaj sonĝoj, vi, kiun neniu alia parto de la tero iam povos anstataŭi en mia koro!"

"Sed, ve, la infana edeno neniam longe daŭras. Baldaŭ la impresiĝema knabo eksuferis sub la pezo de la epoko, ankoraŭ ne solvinta bazajn problemojn de socia kaj interpopola kunvivado. Amare li spertis, ke en Bjalistok sovaĝe interbatalas kvar kontraŭaj veroj per kvar diferencaj lingvoj. Insultoj, ruĝardaj pro malamo, draŝas de unuj kontraŭ la aliajn, ilin ofte akompanas mortigaj hakiloj kaj feraj stangoj. Ludoviko jam ekkomprenis la tragediajn sekvojn, kiam oni praktikis la duoblan librotenadon pri la problemoj de etiko. Oni edukadis lin, ke ĉiuj homoj estas fratoj kaj dume en la stratoj, en la kortoj, ĉe ĉiu paŝo li sentis, ke homoj ne ekzistas, ke ekzistas sole nacioj aŭ religianoj, kiujn blindaj pasioj dividis en la batalajn tranĉeojn".

"Hodiaŭ, kiam la mondo havas aliajn mezurilojn pri la valoroj kaj novajn spertojn pri la evoluaj procezoj en la homa socio, eble multaj analizoj, kiuj kristaliĝis en tiu mondrigardo, ŝajnas iel tro optimismaj kaj idealistaj. Sed, sendepende de tia vidpunkto, juĝante la arbon nur laŭ ĝiaj fruktoj, ni devas emfaze substreki, ke tiun filozofian armaturon ellaboris granda, nobla koro de homo, plena de humaneco, kaj due, ke el ĝi rezultis unu el la plej epokofaraj atingoj de la deknaŭa jarcento: la tuthomara lingvo Esperanto".

"Estus superflue aludi nun al la mirinda arkitekturo de Esperanto, kaj fajli la porargumentojn en la akraĵon de ĥirurgia instrumento aŭ senplumi la lingvistajn teoremojn de niaj kontraŭuloj en marasman nudecon. Sufiĉu diri, ke Esperanto

estas nenio alia ol la organizita sana prudento sur la lingva kampo. La genio de escepta homo en simplajn sonojn kaj grafikajn signojn enblovis vivodone la tutan ondeman spiriton, liberigante ĝin de lingvista miopeco, prilingvaj mitoj kaj metafiziko”.

”Sed ni ne pretervidu la sociajn sekvojn, kiujn elvokis la eliro de Esperanto. Ĝis nun iuj naciaj lingvoj ludis rolon de la internacia sur pli-malpli vasta teritorio. Ilia privilegia pozicio estis kondiĉata aŭ de la supereco de kultura ciklo aŭ de la disvastigo de religio aŭ de minaca kirasita pugno. Fakte tio ne estis vera internaciaj lingvoj, sed lingvoj de la internaciaj rondoj, fermitaj per determinitaj interesoj en ringon. Tiuj rondoj estis kunmetitaj el individuoj, kiuj pro diversaj sociaj avantaĝoj povis elforki sufiĉan porcion da fremda lingvaĵo sur sian avide tenatan teleron. Sed milionoj da teleroj antaŭ la vastaj amasoj popolaj restis malplenaj. Ili, kiuj per siaj kalovundaj manoj verkas la plej valoran parton de la historio sur plugkampoj, en fabrikoj kaj minejoj, sur la simplaj seĝoj de oficejoj, super la provtuboj en laboratorioj, kaj simile — resume ili ĉiuj kiuj plibeligas kaj pliriĉigas tiun ĉi mizeran mondon nian — restas surdaj kaj mutaj, kiam ili renkontiĝas kun la membroj de aliaj nacioj. La moderna vivo transkreskis la ĝisnunajn konceptojn pri la internacia lingvo, ĝi postulas la tutmondan lingvon, kiu — kiel la dua lingvo — servos al ĉiu senescepte kaj ne nur al la fermitaj rondoj intelektulaj aŭ alispecaj. Kaj ekzistas nur unu tutmonda lingvo en la tuta tut-homara historio kaj tio estas Esperanto. Sole ĝi estas proprajo kaj spirita emanaĵo de la tuta homaro”.

”Ĉiu lingvo ĝis nun internacie uzata havis psikologian subkonstruon de unu popolo, de unu kultura tradicio, de segmenta socia evoluo. Tiuj faktoroj estas ja la utero, en kiu formiĝas ĉiu nacia lingvo. Nu, kio restus el la angla lingvo, se ni forigus el ĝi tion, kio estas specife angleca kaj pro tio per si mem tute fremda kaj perforta por la aliaj? Ĉu fakte ne estas naive kredi, eĉ nur pro tiu fakto, ke la tuta homaro fleksos sian nukon en la jugon de lingva sklaveco, torturante sian penson kaj sian senton tra kapricaj spiraloj de apartaj nacilingvaj tradicioj kaj gramatikaj enigmoj?”


”Ni volas liberan esprimilon, komponatan ne de unu popolo, sed de ĉiuj egale, la esprimilon, en kiu sentas sin hejmece ĉies spirito. La nesupertaksebla signifo de Esperanto kuŝas ja ĝuste en tio, ke ĝi ebligas al la pli suferanta parto de la homaro paroli rekte el la koro al la koro, ke ĝi faras la homon parola estulo sur ĉiu punkto de la tero, ke ĝi liberigas ĉiun el la gravito de nur unu lande, de nur unu lingvo, de nur unu kultura tradicio, malfermante la senbaran perspektivon en la tutan mondon”.

”Sed ni ne venis al Varsovio portante subbrake la eburan kesteton, en kiu troviĝas nur la tutmonda lingvo. La valoro de nia kongreso estas multe pli granda, ĉar ĝi ebligas al la varsovianoj disrompi la seruron super la misteroj de la estonteco kaj larĝokule vidi la interpopolan mondon tia, kia ĝi iam devos esti kaj kia ĝi jam delonge estas por nia kolektivo”.

”Zamenhof en sia parolado ĉe la Ĝeneva Kongreso testamentis, ke niaj kongresoj estu la edukajo por la estonta homaro, fariĝinte konstanta festo de homa frateco. La esperantistaro fidele klopodas realigi tiun devon... Ni ne neas, ke inter ni ekzistas diferencaj opinioj kaj kredoj pri multaj, eĉ tre multaj aferoj, sed tio ofte okazas eĉ en la kapoj, kiuj kuŝas sur la sama litkuseno. Tamen nin fortikaj ligiloj kuntenas en la nerompebla falango: unu sama lingvo — Esperanto, unu sama sento — la homeco, unu sama celo — la interpopola paco kaj toleremo, unu sama popolo — la homaro, unu sama patrujo — la tuta mondo kaj unu sama supera tribunalo — la tuthomara konscienco.”

”Ĉu tiu verda oazo dum la kongresaj tagoj estas utopio? Sendube, sed nur por la senperspektivaj cerboj, kiuj en la komplikaĵoj kaj nebulo de la hodiaŭo ne povas malkovri la vojon de la tempo estonta. Kaj tiu kerneto de la estonta homaro, kiun mi vidas nun antaŭ mi en tiu ĉi salono povis formiĝi nur dank'al la genio de la etika Varsovia pensulo Zamenhof kaj ĝi sur la ora pesilo de Tempo estas same valorpeza kiel la tutmonda lingvo Esperanto”.

”La tuta vivo de tiu simpla, sed noblega homo, kiun ni sincere amas kaj respektas, estis plena de afliktoj kaj suferoj. Sed ĉion li eltenis heroe, eĉ ne unufoje perdinte sian idealon. Sian honoron li portis digne kaj ĝi egalas al lia genio. Eĉ en la plej korfendaj momentoj lia senlaca mano konservis la sanktan geston de semanto, disŝutante la grajnoj de homeco kaj paco interpopola. Tiuj semoj falis ankaŭ en viajn korojn, en viajn manojn. Konservu fidele tiujn en la koroj ĝis la tempo de matureco. Kaj tiujn en viaj manoj per la belsonoraj, arĝentaj tintoj de Esperanto ŝutu en novajn korojn... Benata estu la homo, kiu iniciatis tiun movadan riveron, benata estu la hodiaŭa tago kaj grandaj estu ĝiaj sekvoj”.



Memore al Zamenhof, la pola ŝtato eldonis specialajn poŝtmarkojn.

La Dumkongresa Laboro de U.E.A.

CEFAJ DECIDOJ DE LA KOMITATO KAJ ESTRARO

La Komitato de U.E.A. eksterordinare peze laboris. Dum la semajno ĝi havis 7 kunsidojn, tiel ke multajn programerojn de la Kongreso la komitatanoj ne povis partopreni. Kiel konate, la kunsidoj de la Komitato — kiu ja havas pli malpli la karakteron de parlamento — estas publikaj kaj multaj kongresanoj interesite sekvis la diskutojn.

Antaŭ ĉio, la komitatanoj A kaj B alektis kiel komitatanojn C por la nova trijara laborperiodo la jenajn personojn: G. Becker, E. Dahl, H. W. Holmes, H. Jakob, S-ino E. Lapenna, T. Sekelj, J. Thierry, J. Baghy, N. Minnaja, R. Reuchlin kaj E. Woessink, el kiuj la unuaj sep estis reelektitaj kaj la lastaj kvar nove elektitaj. La Komitato nun konsistas entute el 59 komitatanoj.

La Estrara Raporto, kiun ricevis ĉiuj kongresanoj en presita formo, estis detale pritraktata kaj fine unuanime aprobita.

La raporto de la Centro de Esploro kaj Dokumentado kaj ĝia laborplano estis unuanime aprobitaj kun dankesprimoj al ĝia direktoro precipe ankaŭ pro la granda dokumenta materialo prizorgita por la Zamenhof-Jaro.

La financa komisiono detale trastudis ĉiujn financajn raportojn. Laŭ ĝia rekomendo la Komitato aprobis la spezkonton, bilancon, buĝeton kaj aliajn raportojn, sed samtempe nomis konstantan financon komisionon konsistantan el S-roj Albers, Petit kaj Woessink, por pristudi eventualajn plibonigojn kaj simpligojn en la administrado de la diversaj centroj, (Rotterdam, Londono, Stockholm, Genevo).

La Komitato konsideris la jam faritajn agadojn okaze de la Zamenhof-Jaro kaj alvokis ĉiujn siajn membrojn al plej energia plia agado en iliaj landoj por la efektivigo de la baza programo. Dank' al la jam faritaj kampanjoj, la membrostatistiko en la nuna momento estas tre favora kompare al tiu en la pasinta jaro.

La Komitato traktis proponon de regularo pri starigo de internaciaj ekzamenoj, kompilitan de la tiukoncerna komisiono kaj prezentitan de D-ro Azzi. La propono estis akceptita kun kelkaj ŝanĝetoj. La Komitato antaŭvidas ke en la venonta jaro unuan fojon la ekzameno povos okazi.

La Komitato kun ĝojo konstatis la klopodojn por starigo de taŭga monumento al D-ro Zamenhof en Bjalistoko kaj deklaris sian plenan moralan apogon. Volonte ĝi apelacias al la esperantistaro esprimi sian subtenon laŭ sia kapablo.

La Komitato aprobis kontrakton pri kunlaboro, kiun faris la Esperanta Ŝak-Ligo Internacia kun U.E.A.

La Komitato aŭdis raporton pri la laboroj de S-ino M. Haudebine, kiu laŭ lastajara decido de la Komitato troviĝas en Hindujo ekde decembro 1958. Ŝi faris tre penan sed sukcesan laboron en New Delhi, kie ŝi kreis bonan kernon en la Publika Biblioteko. La Komitato esprimis sian grandan dankon kaj admiron pri la laboro kaj persistemo de S-ino Haudebine kaj decidis pri plia financa subvencio de tiu laboro.

La Komitato aprobis raporton de S-ro Malmgren pri la kampanjo por Esperanto en la lernejoj. Ĉar la temo estas eksterordinare grava precipe en la Zamenhof-Jaro, la Komitato akceptis Rezolucion pri laŭgrada enkonduko de Esperanto en la lernejojn, kiun ĝi proponis poste al la Kongreso kaj kiun oni trovas aliloke en tiu ĉi raporto kiel Kongresan Rezolucion.

La Komitato elektis por la nova trijara laborperiodo la jenan Estraron: Prof. D-ro G. Canuto, prezidanto, Prof. D-ro H. Yagi kaj H. W. Holmes O.B.E., vic-prezidantoj, Prof. D-ro I. Lapenna, ĝenerala sekretario, D-ro W. Herrmann, S-ro R. Llech-Walter, S-ro Norman Smith kaj S-ro A. Rajski, estraranoj.

Ankaŭ la Estraro plurfoje kunsidis dum la Kongreso kaj finis tagordon de 28 punktoj.

LA GENERALAJ KUNVENOJ

La Unua Ĝenerala kunveno de U.E.A. okazis sub prezidanteco de s-ro H. Holmes. Unue salutoj de fakaj asocioj kaj de gravaj institucioj kaj organizoj: G. Becker donis raporton pri TEJO kaj la renkontiĝo en Gdansk; s-ro Schödl salutis en la nomo de MEM; pri la landa organizo en Madagaskaro estis raporto de s-ro Bourdelon; por SAT salutis s-ro Martin; por TEJA Ivan Esperov; por Akademio de Esperanto inĝ. Isbrucker; por IKUE s-ro Beckers; por Veterana Esperanto-Klubo s-ro Lewin; en la nomo de Universala Ligo kaj Internacia Esperanto-Instituto salutis s-ino Isbrucker; en la nomo de TEKA prof. d-ro Canuto; en la nomo de ISAE prof. Boja Popovic; en la nomo de Skolta Esperanto-Ligo s-ro Thomson; en la nomo de Internacia Societo de Arkitektoj s-ro Tyminski; en la nomo de Eŭropa Asocio de Eŭropaj Popolaj Universitatoj s-ro Petit; por Orienta Germanujo prof. d-ro Sörgel; pri la monumento al d-ro Zamenhof raportis s-ro Sakowicz, en la nomo de Internacia Geografia Asocio s-ro Tibor Sekelj; en la nomo de Internacia "Marrondo" s-ro K. Ruig; estis trailegata salutletero de Interrilata Centro Internacia de la Esperantistaj Kampadistoj; kaj estis aŭdigata parolata salutletero de la ĝenerala Sekretario de UEA prof. d-ro Lapenna; — en la nomo de "Nuntempa Bulgario" salutis s-ro Asen Grigorov; s-ro Peter Zacho parolis pri la poŝtmarkkolektado. Post

tio oni pritraktis la Estraran Raporton de UEA, kaj ĝi estis aprobita ĉapitro post ĉapitro. Dankesprimon al la Ĝenerala Sekretario, Prof. Lapenna, pro la grandega laboro farita, estis substrekita per forta aplaŭdo.

La surbendigita saluto de la ĝenerala sekretario de UEA, Prof. Ivo Lapenna, aŭdigita en la Unua Ĝenerala Kunveno, tekstis :

"Ĝeamikoj,

Bedaŭrinde malhelpita persone ĉeesti la 44-an Universalan Kongreson de Esperanto, mi direktas al ĝi el malproksimo laŭ tiu ĉi vojo miajn varmajn salutojn kaj tutkorajn bondezirojn por utila, efika kaj fruktodona laboro.

Ĉiu Esperanto-Kongreso estas per si mem unika kultura evento en la hodiaŭa mondo, eĉ se ne estus aliaj kaŭzoj, do certe pro simpla fakto, ke ĝi uzas unu solan, vere internacian, lingvon, kiu ebligas rektan komunikadon. Ĉiu el niaj kongresoj ludis ankaŭ progresivan rolon en la evoluigo de la lingvo mem, en la fortikigo de ĝia interna unueco kaj kohereco, en la firmigo de internacia solidareco. Sed la nuna Kongreso havas tute specialan signifon, ĉar ĝi okazas en la ĉefurbo de tiu nobla lando, kiu donis al la homaro, inter multaj aliaj gigantoj de la penso, precize antaŭ cent jaroj la genion de D-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof.

En la mallonga vivo de la Internacia Lingvo periodoj de florado kaj progresoj interŝanĝiĝis kun tiuj de stagno aŭ, kelkfoje, eĉ regreso. Ankaŭ la rilatado de la publika opinio kaj la starpunkto de la aŭtoritatoj al Esperanto ne estis kaj ne estas ĉiam kaj ĉie la samaj. Tamen, ĝenerale parolante, en la tuta mondo la Internacia Lingvo kaj tiu idearo, kiu estas esence kaj nedisigeble ligita al ĝi, faris konsiderindajn progresojn por atingi en tiu ĉi Jubilea Jaro sian ĝisnunan kulminon. La koro de ĉiu esperantisto kaj entute de ĉiu homo, kiu sopiras al pli amikecaj kontaktoj inter la popoloj, certe pleniĝas de ĝojo kaj fiero pro la fakto, ke precize en 1959 la Kongreso, kiu omaĝe memorigas la 100-jaran datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof, okazas en tiaj kondiĉoj kaj tial povas transformiĝi en imponan manifestacion de pli ol 3.000 reprezentantoj el 5 kontinentoj.

Tio ne estas hazardo. Ĝi estas rezulto de grandaj fortostreĉoj de multaj kleraj laborantoj tra la mondo, kiuj sindone kaj sisteme agis sur diversaj kampoj — de la informado kaj instruado ĝis la literatura kaj scienca kreado — laŭ la grandaj principoj, starigitaj de Zamenhof mem: vera internacieco de la lingvo, profunda internacieco de ĝia idea fono, efektiva internacieco de la kolektivo, kies spirita proprieto ĝi estas. El tiuj fundamentaj principoj sekvis tuta aro da gravegaj atingoj: internacieco de nia literaturo, de nia gazetaro, de niaj organizaĵoj kaj institucioj, de niaj reciprokaj rilatoj, de ĉiuj aspektoj de la esperantismo.

Tiu humanisma internaciismo, enspirita en la lingvon de ĝia aŭtoro kaj flegata en la ĉiutaga praktiko de dekmiloj da homoj estas la bazo, sur kiu konscie estas konstruata la granda lumturo de homeco. En la tempestoj de la nuntempo ĝi montras la solan vojon de la homaro al la propra konserviĝi per integriĝo sen plua sangado kaj torturoj, sen avantaĝoj por unuj kaj humiligoj por la aliaj, kun lojala respekto por ĉiuj kulturaj valoroj, por ĉiuj nacioj kaj por iliaj plej grandaj trezoroj: la naciaj lingvoj.

Sur tiu vojo ni firme kaj energie daŭrigos nian iradon. Al kelkaj, eble eĉ tre potencaj, certe tio ne plaĉos. La aliaj, ĉiam pli kaj pli multnombraj, sendube sekvos. La 44-a Universala Kongreso signu la komenciĝon de tiu nova etapo, kiam la Internacia Lingvo estos instruata en ĉiuj lernejoj de la mondo ne nur kiel teknika ilo de internacia komunikado de la larĝaj popoltavoloj, sed ankaŭ kiel instrumento por kreado de nova tuthomara kulturo —

internacia laŭnhave kaj laŭforme — kaj kiel rimedo de edukado al homeco.

Nia vojo estas ĝusta. Senkompromise antaŭen !"

La Dua Ĝenerala Kunveno, kiun prezidis D-ro W. Herrmann, okazis vendrede. En ĝi estis aŭdataj la raportoj de ĉiuj instancoj, kiuj kunsidis dum la kongreso. Pri la laboro de la Unua Sekcio raportis s-ro Norman Smith, pri la Dua Mag. Isaj Dratwer. Post tio raportis pri siaj laboroj la junularsekcio de UEA, TEJO; la scienca asocio aliĝinta al UEA, ISAE; la kuracista asocio TEKA; la ĵurnalista asocio TEJA; la katolika unuigo IKUE; la instruista ligo ILEI; la jurista asocio IAJE; la ŝakligo EŝLI, ĉiuj kunlaborantaj organizaĵoj de UEA. Poste oni aŭdis informojn pri kunvenoj de Oomoto, la Kooperativa Movado, la pacmovado MEM, de la ĵus fondita esperantista Marrondo kaj de la esperantistaj virinoj. Fine, D-rino Annya Sen, gasto ĵus veninta de konferenco de la Monda Packonsilantaro, portis salutojn de tiu konferenco en angla lingvo, tradukitajn en Esperanton de D-ro Halbedl.

LA LABORO DE LA SEKCIOJ

Unua Sekcio

La temo de la Unua Sekcio de la 44-a U.K. estis: *"La rolo de la Esperanto-Movado en la realigo de la granda projekto de UNESKO pri interŝanĝo de okcidenta kaj orienta kulturaj valoroj"*. Prezidis la kunvenon, kiu okazis lundon la 3-an de aŭgusto 1959, S-ro Eizo Ito, Japanujo. Raportanto estis S-ro Norman R. Smith, Britujo. Ĉeestis 400-500 kongresanoj el plej diversaj anguloj de la mondo.

La raportanto priskribis la celojn de la ĉefprojekto 4-A de UNESKO kaj la rolon de la Esperanto-Movado rilate al ĝi. Li menciis ekzemplojn de grandaj kontribuoj al la realigo de la projekto, jam faritaj kaj farataj. Plue li skizis la planojn de la Komisiono, kiun UEA nomis antaŭ unu jaro por tiu celo. Antaŭvidita estas i.a. eldono de libroserio speciale prilumanta diversnaciajn kulturojn.

En la diskuto partoprenis 9 ĉeestantoj el 6 landoj. Kvankam kelkfoje oni deflankiĝis de la temo, pluraj utilaj informoj kaj sugestoj estis aŭdataj. Elstaris la interveno de la vietnama poeto Dao-anh Kha, kiu, i.a., tre akcentis, ke lia lando bezonegas Esperanton por diskonigi sian kulturon en la mondon kaj, aliflanke, por ekkoni la grandajn valorojn de aliaj kulturoj. Li mem, profesie, tradukadas nacilingven grandajn verkistojn kiel Shakespearo, Mickiewicz k.a., pere de Esperanto.

Fine de la diskuto la raportanto akcentis, ke la celoj de la UNESKO-projekto estas tute paralelaj al la celoj de la Esperanto-Movado kaj ke, do, helpante ĝin, ni helpas nin mem. Li insiste petis, ke ĉiujn dokumentitajn informojn pri agado sur tiu ĉi kampo oni sendu al li kiel sekretario de la Komisiono, aŭ al CED.

La Sekcio aplaŭde akceptis du rezoluciojn, sugestitajn de la raportanto, kaj trian, proponitan de la reprezentanto de T.E.J.A. La Direktorino de la Centra Oficejo de UEA atentigis, ke jam daŭre oni agas laŭ la enhavo de la lasta rezolucio. Pro tio, laŭ la opinio de la Sekcio, oni konsideru ĝin kiel peton daŭrigi kaj intensigi la jaman agadon.

La rezolucioj tekstas jene :

- I. "La Unua Sekcio de la 44-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Varsovio la 3-an de aŭgusto 1959, subtenas la planon eldoni libroserion kontribuantan al la celoj de la UNESKO-Cefprojekto 4 A "Reciproka aprezado de orienta kaj okcidenta kulturaj valoroj" kaj forte rekomendas al la Estraro de UEA plenumi ĝin. Ĝi konsideras, ke, se oni proponas rabaton por antaŭmendoj, la ĉeestantoj mem kaj la esperantistaro ĝenerale nepre mendos amase kaj tiel provizos kapitalon por eldonado".
- II. "La Unua Sekcio de la 44-a Universala Kongreso de Esperanto forte rekomendas al la tuta esperantista gazetaro ke ĝi, interŝanĝe kaj per ĉiuj aliaj rimedoj, presigu artikolojn kaj ilustraĵojn kontribuantaj al la "Reciproka aprezado de orienta kaj okcidenta kulturaj valoroj" kaj plue, ke ili informu kaj CED kaj la Komisionon de UEA por tiu projekto, pri sia intenco, por ke oni povu prezenti al UNESKO konkretajn faktojn pri la utilo de la Esperanto-Movado".
- III. "La Unua Sekcio de la 44-a Universala Kongreso de Esperanto petas kaj la Gazetaran Servon kaj la Informan Fakon de UEA, subteni la laboron de la Komisiono pri la UNESKO-Cefprojekto 4-A, per disdono de taŭgaj informoj".

Dua Sekcio

La laboro de la Dua kongresa Sekcio estis dediĉita ankaŭ dum la Varsovia Kongreso, same kiel en Mainz, al la problemo de niaj societoj. La titolo estis "La funkcio de la Esperanto-societoj en la nuntempa movado". La prezidanto de la sekcio, s-ro Isaj Dratwer malfermis la kunvenon, salutis ne tro multajn vizitantojn, akcentis la gravecon de la temo, invitis ĉiujn preni la jam preparitajn, stencile multobligitajn, referaĵojn kaj demandfoliojn Soc-1959. La prezidanto donis la vorton al la raportantino s-ino Emilija Lapenna, kiu en mallonga parolado kompletigis sian skriban referaĵon akcentinte la gravecon de la Esperanto-societoj unuflanke kaj aliflanke mankon, ke neniam dokumentitaj informoj pri la nombro kaj laboro de niaj societoj ekzistas. Ni eĉ ne scias ilian nombron. Ŝi invitis la ĉeestantojn subteni la proponon de la Dua Sekcio pri enkonduko de la konstanta statistiko pri niaj societoj en formo de tute simpla demandilo "Soc - 1959", enhavanta nur 12 demandojn, kiujn ĉiu societo devus unufoje en la jaro plenumi.

La diskuton partoprenis ĉeestantoj el Bulga-

rujo, Belgujo, Vietnamo, Pollando. Ili ĉiuj subtenis la proponon pri la statistiko kaj konstatis, ke ne estas eble sen posedo de la dokumentita super-rigardo de niaj societoj serioze entrepreni ion ajn tiukampe.

Post la finita diskuto la prezidanto s-ro Dratwer proponis rezolucion, kiu estis per aklamado akceptita.

La rezolucio tekstas jene :

"La partoprenintoj de la Dua Sekcio de la 44 Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio, okazinta la 7-an de aŭgusto 1959, kiu okupiĝis pri la temo : **La funkcio de la esperantaj societoj en la nuntempa movado**, aŭskultinte la referaĵojn de s-ino Emilija Lapenna el Jugoslavio kaj 12 diskutintojn el 10 landoj konstatas :

En la nuna tempo, kiam diversaj oficialaj organizaĵoj ĉiam pli agnoskas la rolon kaj signifon de Esperanto, kiel tiu de la lingvo internacia, plifaciliganta rilatojn inter la homoj de plej diversaj popoloj kaj landoj, nekontestebla estas rolo de la naciaj, landaj, urbaj, lokaj esperantaj societoj kaj grupoj.

La esperantaj societoj kaj grupoj tial devas klopodi eduki kiel eble plej bonajn esperantistojn, fidelajn al la movado, interesigantajn pri la esperanta literaturo kaj gazetaro. Por atingi tiun ĉi staton la societoj kaj grupoj penas pri daŭraj altnivelaj aranĝoj, prelegoj k.t.p., indikantaj kaj instruantaj la kulturen valoron de la lingvo internacia.

La societoj kaj grupoj devas daŭre zorgi pri la ekstera propagando de la ideo de la lingvo internacia, ĉar malgraŭ la sendubaj atingoj kaj sukcesoj oni povas ofte renkonti ankoraŭ misajn aŭ eĉ tute falsajn ideojn pri la lingvo internacia, kiuj grave malhelpas al la plua rekono kaj agnosko de Esperanto. Por atingi kiel eble plej bonajn rezultojn ĉe la ekstera publiko estas necese seriozigi kaj gravigi la esperantajn societojn kaj grupojn. Tiacele estas nepre rekomendinde, ke la societoj kaj grupoj penu havi proprajn aŭ tiajn ejojn, ebligantajn funkciadon kaj ofidadon almenaŭ kelkfoje en semajno kaj havu laŭeble homojn, kiuj por modesta salajro aŭ rekompenco povus sin dediĉi al la ofitado en la societoj, pri-zorgado de urĝaj aferoj, propagando, statistiko.

Unu el la plej gravaj taskoj de la societoj kaj grupoj sendube estas instruado de la lingvo Esperanto al komentantoj kaj progresintoj. Tial ĉiuj esperantaj societoj kaj grupoj zorgu pri altnivelaj kursoj de la lingvo internacia, atentante pri specialaj kursoj de la lingvo por junularo, studentoj, intelektuloj.

Konsiderante, ke disvolviĝo de la esperanta literaturo estas plej bona pruvo de vivanteco de la lingvo internacia la esperantaj societoj kaj grupoj propagandos inter siaj membroj esperantajn librojn kaj gazetojn kaj klopodos ebligi al siaj membroj ilian aĉeton aŭ abonon.

Konsiderante la unikajn rolon kaj signifon de UEA, ĉiuj esperantaj societoj kaj grupoj regule gvidos kampanjojn por varbi novajn membrojn-abonantojn kaj subtenantojn de UEA.

Pro la graveco de la statistiko pri la nuna stato de la esperantaj societoj kaj grupoj, ĉiuj societoj kaj grupoj regule informos CED laŭ la demandfolio "SOC. - 1959".

La Estraro de U.E.A. kompilis projekton de Kongresa Rezolucio, kiun la Komitato diskutis kaj akceptis kun kelkaj modifoj. En la Ferma Kunveno la Kongreso akrame aprobis ĝin. Ĝi tekstas jene :

REZOLUCIO DE LA 44-a UNIVERSALA KONGRESO

La 44-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Varsovio de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto 1959 por memori la centjaran datrevenon de D-ro L. L. Zamenhof kaj partoprenita de 3256 reprezentantoj de la Esperanto-movado el ĉiuj partoj de la mondo unuanime

(1) **DIREKTAS** sian omaĝon al la lando, kiu donis al la mondo la genian aŭtoron de la Internacia Lingvo kaj esprimas sian dankon al ĉiuj aŭtoritatoj kaj institucioj, kiuj faciligis la okazigon de tiu ĉi impona manifestacio honore al la memoro de D-ro L. L. Zamenhof;

(2) **KONSTATAS** kun plezuro, ke la Internacia Lingvo faris konsiderindan progreson, disvastiĝis tra la tuta mondo kaj penetris en ĉiujn sociajn tavolojn; ke ĝi daŭre kaj progresive riĉiĝas per nova kultura enhavo, per multnombraj tradukoj el ĉiuj lingvoj kaj per la literatura kaj scienca kreado originale en Esperanto; ke lernolibroj kaj vortaroj en Esperanto estas publikigitaj praktike en ĉiuj naciaj literaturaj lingvoj; ke, paralele kun la disvastiĝado, kun la kreskado de la beletra kaj scienca literaturo, kun la multobligado de la internaciaj kontaktoj inter la personoj, kiuj ĝin uzas, kaj ĝenerale paralele kun la vastiĝo de ĝiaj aplikoj en la praktiko, la lingvo interne tre evoluis, sed samtempe konservis kaj eĉ fortikigis sian unuecon kaj koherecon; ke sekve la Internacia Lingvo fariĝis nekontestebla socia fakto, internacie enradikiĝinta kaj matura por plua, multe pli vasta utiligo en la internaciaj rilatoj;

(3) **MEMORIGAS**, ke UNESKO per sia rezolucio de la 10-a de decembro 1954 rekonis, ke "la rezultoj atingitaj per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo... respondas al la celoj kaj idealoj de UNESKO", kaj komisiis sian

Ĝeneralan Direktoron: "sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo"; ke per la sama rezolucio UNESKO konstatis la fakton, ke pluraj ŝtatoj deklaris sin pretaj: "enkondiĉi aŭ ampleksigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj" kaj petis tiujn Ŝtatojn-Membrojn informadi la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj atingitaj sur tiu kampo;

(4) **KONSTATAS**, ke ekde la akcepto de tiu Rezolucio en 1954 la lingva problemo en la internaciaj organizaĵoj kaj ĝenerale en la internaciaj rilatoj plue akriĝis pro la pligrandiĝo de la nombro de "oficialaj lingvoj", pro la konstanta ampleksiĝado de la internaciaj rilatoj mem al novaj sferoj kaj pro la daŭre kreskanta nombro da personoj kiuj ĉiam pli partoprenas en internacia komunikado, de internacia politiko kaj scienco ĝis la ordinara turismo;

(5) **ESPRIMAS** sian firman konvinkon, ke tiun lingvan problemon povas plene kaj juste solvi — sen avantaĝoj por unuj kaj sen humiligoj por aliaj — nur la neŭtrala kaj supernacia Esperanto, pruvita kiel perfekta instrumento de internacia komunikado dum pli ol 70 jaroj, kaj opinias, ke la plej efika metodo por plua praktika utiligo de la lingvo en la internaciaj rilatoj estas ĝia laŭgrada enkonduko en la lernejojn.

KONSIDERANTE TION, la 44-a Universala Kongreso de Esperanto

(I) Alvokas ĉiujn Registarojn atente pristudi la eblecon organizi eksperimenton de paralela instruado de la Internacia Lingvo Esperanto en kelkaj lernejoj;

(II) **REKOMENDAS** al UEA kaj al la organizaĵoj apartenantaj al ĝi doni al ĉiuj internaciaj aŭ naciaj aŭtoritatoj sian plenan helpon por la realigo de tiu ĉi Rezolucio.

En Varsovio, la 8-an de aŭgusto 1959.

Ĉefaj Kulturaj Aranĝoj

INTERNACIA SOMERA UNIVERSITATO (I.S.U.)

Ĉi-jare prezidis la rektoro de I.S.U. prof. d-ro Tadeusz Kotarbinski, prezidanto de Pola Akademio de Sciencoj kaj profesoro de Varsovia Universitato. Post bonvenigaj vortoj al la profesoroj de la Internacia Somera Universitato kaj al la ĉeestantoj, komenciĝis la 12-a Sesio de la I.S.U.

Prof. d-ro Paul Neergaard, doktoro de agronomio, sekciestro de ŝtata Plantpatologia Servo, Kopenhago, Danlando, laŭ invito profesoro pri semteknologio kaj plantpatologio ĉe la Amerika Universitato de Beirut, Libano (1959-1960), membro de Akademio de Esperanto, prelegis pri: "La lukto

kontraŭ la malsato — ĝia internacia organizado". Ankoraŭ hodiaŭ homoj malsatmortas, kaj multaj konfliktoj naciaj kaj internaciaj plejparte havas materiajn kaŭzojn. Per FAO kaj similaj organizaĵoj oni klopodas pliintensigi plantproduktadon precipe en teknike malantaŭeniĝintaj regionoj por tiel iom post iom forigi la mizerojn de la malsato.

Josip Vrančić, diplomito de la art- kaj kulturhistoria fakultato en Zagreb, Jugoslavio, prelegis pri: "Estetika analizo de urbanisme-arkitekturaj karakterizoj de la urbo Dubrovnik". La temo estis proksimume tiu de lia doktora tezo, nun preparata, nome harmonia kunfandiĝo de naturaj belajoj kun

nobla malnova arkitekturo kaj eksterordinare bone elmezuritaj rilatoj inter partoj kaj tuto, fundamentaj estetikaj valoroj de la urbo Dubrovnik, la "adriatika perlo".

Prof. d-ro Hugo Sirk, emerita profesoro pri fiziko en la Universitato de Wien, Aŭstrujo, lektoro pri Esperanto en la Teknika Universitato en Wien, prelegis pri: "La centjara jubileo de la spektranalizo en 1959". Se fasko de blanka lumo pasas tra prismo, oni ricevas garbon de diverskoloraj radioj, kiuj estigas sur blanka ekrano bendon, en kiu la koloroj kontinue transiras unu en la alian. En 1859 Kirchhof pruvis, ke ĉiu korpo absorbas lumon de tiu frekvenco, kiun ĝi en la donitaj cirkonstancoj elsendas. La spektroskopio estas aplikata en la plej diversaj branĉoj de kemia esploro.

Marjorie Boulton, M.A., B. Litt. (Oxford), Anglujo, vicdirektorino de instruista seminario, lektorino pri anglaj lingvo, literaturo kaj parolarto, verkistino angla kaj Esperanta, "Aŭtoro de la Jaro" Esperanta, 1958, prelegis pri: "Joseph Conrad — polo kiu estis granda angla verkisto". Teodor Józef Konrad Korzeniowski estis polo, kiu iĝis angla maristo kaj unu el la plej eminentaj anglaj romanistoj. Lia lingva stilo estis rafinita, lia priskribo de la maro kaj liaj psikologiaj konceptoj same.

Prof. d-ro B. Popović, profesoro pri matematiko en la Arbarista Fakultato de Universitato Sarajevo, Jugoslavio, membro de la Internacia Astronomia Unio, prezidanto de la Respublika Societo de Matematikistoj kaj Fizikistoj en Sarajevo, ĝenerala sekretario de Internacia Scienca Asocio Esperantista, prelegis pri: "Eblecoj kaj malfacilaĵoj por interplaneda vojaĝo". Realigo de la Teraj artaj satelitoj kaj de la unua arta planedeto malkovras novajn vojojn por ekkono de aliaj mondoj. Parolis pri la ĝisnunaj teknikaj atingiĝoj kaj la restintaj problemoj, pri la loka trafiko inter la Tero kaj konstanta artefarita platformo-satelito, astronomia flanko de la problemo, malfacilaĵoj por alteriĝo, resp. "almarsiĝo". Biologiaj problemoj.

D-ro Andrzej Rzymkowski, eksterordinara profesoro de Arkitektura Fakultato ĉe la Politekniko en Krakovo, Pollando, prelegis pri: "Mezepoka kaj renesanca pola arkitekturo". Klarigis precipe la diferencojn inter eksterlandaj kaj polaj arkitekturaj formoj kaj detaloj.

Prof. d-ro Halina Szabłowska, altlerneja profesorino, direktoro de Studoj en la Altlernejo de Eksterlanda Komerco en Varsovio, aŭtoro de multaj metodaj verkoj pri lingvo-instruado, prelegis pri: "Jarmileco de la pola ŝtato". Traktis pri la ekesto de la pola nacio kaj ŝtato rezulte de kelkjarcenta socia procezo, pri la nacia historio surbaze de la progresema tradicio kaj politiko de Pollando, kaj specialan atenton dediĉis al la kulturaj akiroj

de la miljara nacio kaj ties partopreno en la civilizacio kaj kulturo de la homaro.

D-ro Andreo Grebecki, kiu studis ĉe la biologia fakultato de la Universitato en Łódź, doktoriĝis (1954) ĉe la Pola Akademio de Sciencoj, aktuale estas adjunkto en Nencki-Instituto de Eksperimenta Biologio de la Pola Akademio de Sciencoj kaj en la Varsovia Universitato, prelegis pri: "Centjareco de evoluismo". Naskiĝo de evoluismaj teorioj en verkoj de Jean Lamarck kaj de Charles Darwin kaj ilia esenco. Plua historia disvolviĝo de ambaŭ evoluismaj vidpunktoj. Fragmento de la prelego estis dediĉita al esenco de la klasika teorio de Darwin, kaj estis ilustrita per lumbildoj.

Prof. d-ro Giorgio Canuto, direktoro de la Jurmedicina Instituto en Torino kaj ordinara profesoro pri jurmedicino en la Universitato de Torino, eks-Rektoro de la Universitato de Parma, membro de la Akademio de Esperanto, prelegis pri: "Praktikaj aplikadoj de l' seksa diagnozo en ĉeloj". En la lastaj dek jaroj interesaj studoj pri la aspekto de la kerno de la ĉeloj de diversaj histoj kaj de la sango, permesis diferencigi la ĉelojn apartenantajn al virinseksaj individuoj de tiuj de la viraj. En la kampo de jurmedicino tiu eltrovo donas la eblecon fari tiun diagnozon en interesaj praktikaj kazoj, pri la deveno de sangmakuloj, de haroj, de malgrandaj histaj restaĵoj, ktp, kun granda helpo por la juĝeja esplorado.

LA TEATRAJ VESPEROJ

Neniam en la historio de la kongresoj la artaj manifestacioj estis tiel riĉaj kvante kaj kvalite. Estis prezentitaj ne malpli ol tri grandaj teatraĵoj kaj, plie, la Balta Opero regalis la kongresanaron per rava baledo.

Tri dramaj verkistoj de monda formato estis reprezentitaj de famaj verkoj. La konata trupo "La Verda Ĉaro de Julio Baghy" el Praha ludis la kvinaktan teatraĵon "Pigmaliono" de la brita verkisto G. B. Shaw, la "Bulgara Esperanta Teatro" el Sofio prezentis la komedion "Ĉasantoj de Oficoj" de la bulgara aŭtoro Ivan Vazov kaj la "Internacia Arta Teatro" amuzis la kongresan publikon per "La Friponaĵoj de Skapeno" de la fama franco Molière. En la venonta numero de nia revuo aperos recenzoj pri la prezentadoj.

BELARTA KONKURSO

La intereso por tiu ĉi institucio estas kreskanta inter niaj verkistoj. Pasintjare alvenis 70 konkursoj, sed por 1959 konkursis 88 verkoj el 20 landoj de 40 verkistoj el ĉiuj kontinentoj. Nur la intereso de la publiko en Varsovio ŝajnis stagnanta. Oni ja scivolis pri la rezultoj, sed ne pri la prezento, kiu fakto devus instigi al pli adekvata kadro de la evento, ekzemple en pli intima salono, en malpli densa premo de aliaj gravaj aranĝoj.

La kunvenon gvidis *Gerald C. Jervis*, kaj la premiitajn verkojn legis laŭ la teknikaj cirkonstancoj treege bone *Julio Baghy*, *Eva Seemanova* kaj *Emilija Lapenna*. La juĝkomisiono konsistis el *W. Auld*, *G. C. Jervis*, *C. Conterno Guglielminetti*, *R. Bernard* kaj *M. Lukaš*. — La premiojn de 14 ĝis 4 us. dol. gajnis:

Originala poezio:

1-a premio: *Albert Samyn*, Belgujo ("Intimo").

2-a premio: *Edwin de Kock*, Sudafriko ("Kvar sezonoj de la koro").

3-a premio: *Jofko Staněk*, Ĉeĥoslovakio (Ĉosan, malgranda japana pupeto")

Originala prozo (noveloj):

1-a premio: *Clelia Conterno Guglielminetti*, Italujo ("Vivo kaj morto de Wiederboren").

2-a premio: *Tom Fraser*, Skotlando ("Al la atendejo").

3-a premio: *Antonija Albert*, Jugoslavio ("Neniam plu").

Tradukita poezio:

1-a premio: *Horst Michling*, Germanujo ("Parolas maljunulo" de Erich Kästner).

2-a premio: *Lucien Thevenin*, Francujo ("Aprilo" de André Rivoire).

3-a premio: *Albert Samyn*, Belgujo ("17-a kanto" de Hadenyeh).

Originala dramo:

1-a premio: *Albert Samyn*, Belgujo ("Eĉ se nur unu . . .", radio-dialogo pri la lastaj horoj de d-ro Zamenhof).

2-a premio: *Edwin de Kock*, Sudafriko ("Rapsodio en Verdo", komedieto).

3-a premio: *Emilija Lapenna*, Jugoslavio ("Al la plej granda malamiko", radio-dramo).

Premion por NOVA TALENTO ricevis *Sandor Cszaszar*, Hungarujo ("Kun neĝ' arĝenta pasas la vintro", originala poemo).

ARĜENTA SPRONO DE KOKO

Dum la Belarta Konkurso ankaŭ okazis solena proklamo pri la "Aŭtoro de la jaro" per transdono de la *Arĝenta Sprono de KOKO* kun diplomo. Nome de Eldonejo KOKO s-ro *Poul Thorsen* motigis la elekton de *Juan Régulo Pérez* el proponaro de Internacia Verkista Asocio. En la Zamenhof-jaro Régulo Pérez kiel eldonisto agis sendube plej multe, kvante kaj kvalite, por nia originala beletero. Per verkado de eseoj, kritikoj (aperonta libroforme sub titolo "Rikolto"), sed precipe per mecena kuraĝigo al niaj verkistoj Régulo Pérez riĉigis la tutan esperantistan kulturon.

Pro neĉeesto Régulo Pérez dankis per kortuŝa letero nome de la "ĉiesverkista entrepreno STAFETO".

ORATORA KONKURSO

La temo de la ĉijara Oratora Konkurso estis: "La Personeco de D-ro L. L. Zamenhof". La junaj oratoroj devis pritrakti la temon el sia propra vid-

punkto, nome, devis prezenti kiel la personeco de Zamenhof influis aŭ impresis ilin mem. Kiel konate, la parolantoj devas libere paroli, do ne rajtas legi la tekston. Fakte nur la unua oratoro, samtempe la gajninto de la unua premio, la italo Carlo Minnaja, tute plenumis ĉiujn postulojn. La duan premion gajnis la polo Stanisław Swistak. La tria ne estis aljuĝita. La premioj estis donitaj el la Donaco-Maillard, pri kiu aperis artikolo en la maja numero de "Esperanto". La juĝa komisiono konsistis el: S-ro Ivo Rotkvič, prezidanto, D-ro G. Azzi kaj S-ro G. Becker.

FILMOJ

Estis prezentataj TRI FILMOJ: la kolora filmo el la vivo de la hungaraj infanoj, kiuj mem gvidas malgrandan fervojon por publika uzo (nur en la hungara lingvo); pola kolora filmo en Esperanto "Varsovio matene"; pola dokumenta filmo kun Esperanta komentario "Vidindaĵoj de Wrocław". La prezentadon partoprenis pli ol 500 personoj.

KVINA ELMONTRO DE LA UNIVERSALA EKSPOZICIO

Ankaŭ en Varsovio la granda Ekspozicio, kompilata de la Centro de Esploro kaj Dokumentado kaj unuan fojon montrita en Montevideo, trovis indan lokon kaj artan aranĝon. En la larĝaj fumejoj de la kongreseja teatro la materialo estis bele ordigita en vitrinoj, dum sur grandaj tabuloj estis videblaj la opinioj de famaj personoj pri Esperanto, la foto-afiŝoj de UNESKO ktp.

Inaŭguris la Ekspozicion de pola vic-ministro de Kulturo kaj Arto, Michal Rusinek, en ĉeesto de multaj eminentuloj de la Esperanto-Movado, LKK, multaj kongresanoj kaj granda nombro da ĵurnalistoj.

En la sama ejo estis montrataj la konkursaĵoj de polaj skulptistoj por la monumento en Bjalostoko, kiel ankaŭ verkoj de itala pentristo kaj esperantisto, Eupremio Lo Martire.

La ekspozicio restis ankoraŭ tutan semajnon post la kongreso, kiam la teatro funkciis kiel kinejo, tiel ke tiam la granda publiko eĉ vole nevole vidis ĝin. Pri la eleganta aranĝo respondecis Ing. K. Tymński.

LA CSEH-SEMINARIO

Ankaŭ ĉijare estis daŭrigata la bona tradicio de la lastaj jaroj, okazigi antaŭ la Kongreso Seminarion por Cseh-instruistoj sub gvidado de Andreo Cseh mem. Ĝi komenciĝis la 29-an de aŭgusto kaj do daŭris kvar tagojn, dum kiuj la partoprenantoj streĉe laboris matene, posttagmeze kaj vespere. Sed, kvankam laciga, ĝi estis brila sukceso.

Evidente, multaj orient-eŭropaj esperantistoj kaptis ĉi tiun unikan okazon ekkoni S-ron Cseh kaj lian faman metodon. Ne malpli ol 270 personoj el plej diversaj landoj partoprenis la lecionojn. Ni povas nur esperi kaj fidi ke el inter ili kreskos

nova armeo de Esperanto-instruistoj, tiel nepre bezonata.

LA INTERKONA VESPERO

Sabate vespere antaŭ la malfermo de la Uni-

versala Kongreso la jam alvenintaj kongresanoj kolektiĝis en la balaj salonegoj, kie ili vigle kaj ĝoje salutis unu la alian en bona antaŭkongresa atmosfero.

La Tago omaĝe al D-ro Zamenhof

La centjara reveno de la naskiĝtago de d-ro Zamenhof estis markita en la Kongreso per dediĉo de tuta tago en la programo al lia memoro. Varsovio estis detruita 85-procente, do oni ne plu povas viziti la diversajn ejojn, kie li loĝis aŭ laboris. Tute malaperis lia domo en la strato Dzika, kiu ekde 1931 estas nomata strato de d-ro L. Zamenhof. Tie nun staras kelketaĝa apartamentaro kaj al la muro de n-ro 5 estas almetita granda memortabulo. Pro sia malsano la urbestro de Varsovio devis delegi la vicurbestron, Wład. Wit. Spychalski, kiu interalie diris: "... Neniu tute certe supozis antaŭ 86 jaroj, ke fakto, ke ekloĝis ĉi tie la familio de Zamenhof kun 14-jara Ludoviko, ligos ĉi tiun straton kaj ankaŭ la urbon nian kun historio de movado, kiu ekregis jam la tutan mondon, la homojn de diversaj lingvoj, diversaj rasoj kaj nacioj. Kaj tamen jam duonan jarcenton poste, dum la vivo de unu generacio al strato Dzika oni donis la nomon Zamenhof, nomon de la kreinto de Esperanto, kreinto de ŝlosilo por la tuta mondo."

La vicurbestro solene malkovris la memortabulon en la ĉeesto de miloj da Esperantistoj kaj Varsovianoj, kiuj tute plenigis la grandan spacon antaŭ la konstruaĵo en la nuna larĝa Zamenhofa strato. Lia simpatia parolado ne konsistis el formalaj vortoj de oficialulo sed el vera sento de urba instanco, kiu tre alte taksas la genian laboron de sia mondfama urbano. La neesperantistaj Varsovianoj estis evidente tre impresitaj de la paroladoj de Esperantistaj reprezentantoj el la kvin kontinentoj, kiuj emfazis la apartan kontribuon, kiun Esperanto faras aŭ povas fari en la tre malsimilaj cirkonstancoj kiuj troviĝas en la diversaj mondpartoj. La memortabulo atestas en pola lingvo kaj Esperanto, ke tie de 1898 ĝis 1915 vivis kaj laboris d-ro L. L. Zamenhof, la aŭtoro de Esperanto.

Post la paroladoj la kongresano iris al la juda tombejo por fari silentan omaĝon ĉe la tombo de

Zamenhof. Unue metis sian florkronon la 40 infanoj de la infankongreseto. Sekvis laŭvice ministroj de la Pola Registraro, la Estraro de UEA, reprezentantoj de la urbo Varsovio, de diversaj landoj, de akademioj kaj klerigaj instancoj, de la juda komunumo, ĝis kiel florgardeno aspektis la dekliveto antaŭ la tombo. Reprezentantoj de 43 landoj triope preterpasis la tombon, digne kaj sincere farante sian omaĝon al homo, kies pensoj kaj vivlaboro tiom profunde influis lian vivon. Nove purigita, la tombo tre impone aspektis kontraste al la verda fono malantaŭ ĝi; kaj la nove reĉizitaj literoj sur la apuda kolono honore al Klara Zamenhof memorigis al ni, kiom multe ni esperantistoj ŝuldas al ŝi. La posta vojo preterpasis la tombojn de Felikso kaj Leono Zamenhof, la fratoj de Ludoviko, kaj tie apud tiu de Markus, lia patro. Post tuta horo, kiam la lasta kongresano estis jam preterpasinta, la Estraro de UEA kaj la prezidanto de LKK ree staris silentaj antaŭ la tombo por fermi tiun ĉi manifestacion de estimo kaj honoro fare de la kelkmil ĉeestantoj, kiel reprezentantoj de la centoj da miloj tra la mondo, kiuj spirite ankaŭ partoprenis la omaĝon.


Vespere dum la solenaĵo prezidis prof. d-ro G. Canuto. La eta Hanja Zamenhof, filino de inĝ.



En la strato Zamenhof, dum la malkovro de la memortabulo.

Ludoviko Zamenhof, la nepo de d-ro Zamenhof, kortuŝe deklamis "Ho, mia kor'", kaj Julio Baghy legis "Centjara estus jam la koro...", por tiu ĉi okazo verkita poemon de K. Kalocsay, kaj propran poemon.

Parolis la ambasadoro de Vietnamo en Moskvo, pianludis verkitaĵojn de Chopin Imre Ungar, la blinda hungara pianisto. Fine faris omaĝan paroladon Andreo Cseh. Kiel decas por naskiĝdatreveno la lastaj partoj de la programo konsistis el kantoj kaj baleto prezentita de la Balta Opero, kaj kantistoj de la ĉeĥa kaj bulgara operoj. La alta kvalito de tiuj prezentoj plene akordis kaj taŭge kaj plaĉe finis la elstaran tagon en la historio de la Esperanto-movado.



La prezidanto de UEA, Prof. D-ro G. Canuto, metas florkronon sur la tombon de D-ro Zamenhof.

EKSKURSO AL BĴALISTOKO

Tri ekskursoj alvokis la esperantistojn en Varsovio. Sed tamen, la plimulto elektis Bjalistokon kaj tion ne bedaŭris, ĉar la vizito tie vere estis mirinda.

Je la 6,30 -a horo la partoprenantoj forlasis Varsovion kaj estis en Bjalistoko iom post la 10,30-a. Tie atendis ĉ. 150 bjalistokaj skoltoj por bonvenigi la gastojn.

En la placo inter la stratoj Malmeda kaj Spóldzielozza kunvenis la esperantistaj gastoj kun ĉ. 2000 loĝantoj el Bjalistoko. La prezidanto de la Urba Popolkonsilantaro, s-ro Krochmalske, salutis ĉiujn partoprenantojn de la ekskurso kaj esprimis sian esperon, ke unu el la venontaj Universaliaj Kongresoj okazu en Bjalistoko. Prof. d-ro G. Canuto, la prezidanto de U.E.A., parolis pri la fameco de la urbo Bjalistoko pro ĝia meritplena filo — d-ro L. L. Zamenhof. Post la parolado prof. Canuto cementis la unuan ŝtonon de la nova monumento por d-ro Zamenhof. — Partoprenis muzikistoj, kiuj ludis polajn melodiajn kaj fine "La Espero". Estis emociiga momento.

Poste la ĉeestantaro, sekvante la muzikistojn, kiuj daŭre ludis, iris procesie al la naskiĝdomo de d-ro Zamenhof. La vera hejmo de d-ro Zamenhof detruigis dum la milito, sed estas novkonstruita domo tute simila al la malnova. Ĝi havas tabulon kun jena teksto: "Ĉi tie staris la domo, en kiu la 15-an de decembro 1859 naskiĝis la kreinto de la Internacia Lingvo Esperanto, d-ro Ludoviko Zamenhof". Antaŭ tiu domo la ĉeestantaro observis dum kelkaj minutoj pian silenton,

Poste, alveno al la nova lernejo, kiu ricevis la nomon de "Lernejo Zamenhof". Okazis malkovro de memortabulo, kaj la vicprezidanto de la Urba Popolkonsilantaro, s-ro Konstanty Kozłowski, en parolado diris, ke la nova lernejo estas konstruata en la kadroj de tutnacia pola movado. — Sur la tabulo oni post la malkovro povis legi jenan tekston: "En la centjara datreveno de naskiĝo de d-ro Ludoviko Zamenhof — 6.VIII.1959". S-ro Klodocki, sciigis, ke en tiu lernejo estos instruata la Internacia Lingvo por ĉiuj gelerntoj. Du sesjaraj geknaboj pollingve salutis la Kongreson, kaj Julio Baghy esprimis sian deziron pri bona estonteco por nia movado.

Ni firma esperas, ke en tiu simpatia urbo la Lernejo Zamenhof estos favora okazo al la gelerntoj por interesiĝi pli kaj pli pri Esperanto, same kiel ni deziras, ke en la tuta mondo la nomoj de d-ro Zamenhof kaj Esperanto respeguligu por ĉiuj la noblan simbolon de daŭre internacia amikeco.



Hanja Zamenhof, pranepino de la aŭtoro de Esperanto, 5-jara filineto de Inĝ. Ludoviko Zamenhof.

Fakaj kaj Neneŭtralaj Organizaĵoj

Internacia Scienca Asocio Esperantista havis sian jarkunvenon sub prezido de **d-ro Paul Neergaard**, Danlando. 46 partoprenantoj el 18 landoj ĉeestis.

Oni dediĉis la plej grandan atenton al la fakaj lernolibroj por studentoj kaj por pli vasta publiko, tiel ke la terminaroj estu sekvo de praktika faka uzo de Esperanto. Sed aliflanke penetro en alt-nivelan sciancan literaturon estas bezonata, ĉar ĝi kontaktigas nin kun vasta scienca publiko. Estas gravege ekfunkciigi la Centron por Internaciaj Kulturaj Interŝanĝoj, ĉar tio plilarĝigas la merkaton por nia literaturo. Oni decidis klopodi ankaŭ ĉe UEA, ke oni organize solvadu la problemon de interŝanĝado de Esperanta literaturo inter ĉiuj landoj senescepte.

Oni kritike diskutis la verkon **SCIENCAJ STUDOJ** kaj interkonsentis pri ĝia alta kvalito, kiel ankaŭ pri la bezono aperigi baldaŭ la duan volumon.

Studenta Tutmonda Esperantista Ligo kunvenis sub prezido de Nicola Minnaja. Estis prezentitaj kaj la raporto pri la agado dum la pasinta jaro kaj la jarfina bilanco kun la spezokonto de la antaŭa jaro. La nova estraro elektiĝis, kaj oni fiksas la kotizon.

Internacio de Militrezistantoj okazigis kunvenon, kiun partoprenis 30 personoj de 6 landoj. Prezidis **s-ro Alfred G. Tucker**, Britujo, kiu transdonis la salutojn de la konsilantaro de I.M.R., priskribis la kondiĉojn en multaj landoj utiligi la eblecon laŭleĝe rifuzi la militan servon. La fundo de la rifuzo troviĝas en la firma kredo, ke milito estas krimo kontraŭ la homaro; la neperforta bazo de la ĉiutaga vivo trovas ekzemplojn en la agoj de William Penn, Gandhi kaj de Vinoba Bhave en Usono. Pli ol la perforta metodo efikas la amo. Sekvis vigla diskuto.

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. La komitatan kunvenon prezidis f-ino Jeanne Dedieu, gimnazia profesorino en Toulouse. Tagordo konsistis el raportoj financaj kaj moralaj. Sekvis diskutado pri medioj de akirado da pli bona funkciigo de la asocio. Dum alia kunveno s-ino Roma Thorsen raportis pri deviga instruado de Esperanto en Kopenhago kune kun geografia instruado por 10-11-jaraj lernantoj 2 horojn semajne. Sekvis raportoj el multaj aliaj landoj. Oni preparolis la pedagogiajn seminariojn venontjare en Francujo kaj Jugoslavio.

Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio kunvenis sub prezido de prof. d-ro Canuto por pridiskuti la revigligon de T.E.K.A. La prezidanto kaj estraro reelektiĝis. Oni preparolis la propagandon de Esperanto inter kuracistoj kaj enkondukon de

Esperanto-resumoj en profesiaj revuoj. Oni decidis krei konstantan adreson por Esperantista kuracistaro en Krakovo.

En la Akademio de Esperanto okazis publika debato "Diskuto pri geografiaj Nomoj", kiun prezidis inĝ. Isbrucker. Ĉeestis pli ol 500 kongresanoj. S-ro Tibor Sekelj prezentis la enkondukan referaĵon, kiu montras la bazajn principojn por kreo de mondmapo en la Internacia Lingvo. Tiu laboro daŭros plurajn jarojn, kaj ĝin gvidos 6-membra komisiono de akademianoj kaj 6 anoj de Internacia Geografia Asocio.

Internacia Societo de Arkitektoj kaj Konstruistoj-Esperantistoj okazigis apartan fakunvenon sub prezido de ark. Kazimierz Tyminski, Pollando, kiun partoprenis 32 personoj el 12 landoj. Post la raporto pri la ĝisnuna laboro oni preparolis la interrilatojn kun la aliaj fakaj kaj Esperantaj organizaĵoj, kaj oni decidis aliĝi al ISAE. Elektiĝis administra komitato konsistanta el 10 personoj el 7 landoj: prez. K. Tyminski. Krome estas elektita aparta redakta komisiono por specialista faka vortaro.

La II-a Konferenco de Mondpaca Esperantista **Movado** okazis sub prezido de s-ro Nikolaj Parvanov, Bugarujo, kaj s-ro Karl Kvist, Svedujo. La tagordo: 1. salutoj, 2. elekto de proponkomisiono, 3. raporto de Bologne, 4. diskuto pri la raporto, 5. rezolucioj. Ĉeestis ĉirkaŭ 150 partoprenantoj el 17 landoj. Oni decidis daŭrigi la eldon-sistemon de "Paco" kaj aprobis la statutojn por tio. Finante oni akceptis rezolucion pri la pac-laborado inter la esperantistoj, kaj oni sendis telegramon al la Konferenco de Eksterlandaj Ministroj en Genevo pri solvo de la Okcidentberlina demando.

Virina Fako de Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro kunvenis sub prezido de s-ino Borbbala, Hungarujo kaj pritraktis la temon: "La esperantistinoj por la interkompreniĝo de la popoloj kaj por la mondopaco".

Societo de Gefratoj kunvenis sub prezido de s-ro Derrick P. Faux kaj pritraktis la temon "Fratecaj Komunumoj en la Nuntempo". S-ro Faux preparolis grupojn de homoj, kiuj povas fari laboron, kaj li citis kelkajn problemojn.

Internacia Geografia Asocio okazigis kunvenon, kiun prezidis s-ro Tibor Sekelj. Ĉeestis reprezentantoj el 10 landoj. Post la raporto kaj elekto de la estraro sekvis vigla diskuto. Oni decidis unufoje jare aperigi "Geografia Revuo". — "Marista Rondo" akceptiĝis kiel sekcio de I.G.A. kun s-ro K. Ruig kiel speciala komitatano. Nederlando kaj

Jugoslavio estis proponitaj kiel loko por la venontjara antaŭ-kongreso de IGA.

Esperantista Ŝak-Ligo Internacia. Sub prezido de s-ro Torsten Lindberg, Svedujo, kunvenis EŜLI por pritrakti organizajn demandojn kaj propagandon inter ŝakistoj. Post voĉlegado de la protokolo sekvis raporto. D-ro Faigl el Ĉeĥoslovakio estis elektita kiel redaktanto de aperonta ŝakrubriko en "Nuntempa Bulgario". Priparolita estis presigo de reguloj por korespondturniroj de EŜLI kaj pri formo de fakterminaro publikigota en jarlibro de UEA.

Veterana Esperantista Klubo kunvenis sub prezido de ing. Tyminski, Pollando. Partoprenis 34 veteranoj el 12 landoj. Laŭ la jarraporto aliĝis 36 kaj mortis 30 membroj, kaj la membroj de VEK estas nun 680, el kiuj 340 nun estas jubileanoj. S-ro Czechowski, Pollando, esprimis deziron, ke oni verku pri tiuj, kiuj laboris en la Esperantomovado kaj kun kiu rezulto. La rezulto aperu en gazetoj. VEK devas esti reprezentata kaj ĉe la malfermo kaj ĉe la fermo de U.K., kaj kunhelpi kun informoj por la eldonota enciklopedio KIU ESTAS KIU EN LA ESPERANTO-MOVADO ?

Oomoto-Movado aranĝis prelegon de la japano Eizo Ito pri la fundamentaj principoj de Oomoto-Movado. Ĉiuj parteprenantoj el 15 landoj konsentis pri la opinio, ke la religio kaj scienco devas respekti unu la alian, kaj ke ĉiuj religiaj kaj spiritaĵoj movadoj devas kunlabori por la paco en la mondo kaj la feliĉo de la homaro.

Pri **La Kosmaj Analizoj de Martinus** parolis P. Zacho, Danlando. Li pritraktis la temon reenkarriĝo kaj parolis pri la mondituto kiel unu ĉioamplaksa vivaĵo, en kiu ĉiuj vivuloj spertas vivon, kaj kie regas kosma bonordo. Poste parolis prof. Zawado, Pollando, pri la neceso de toleremo kaj kunlaborado inter la diversaj spiritaĵoj.

Framasona kunveno okazis, kiel ankaŭ la **Kooperativistoj** havis kunsidon, kiun prezidis s-ro Vilho Salonen, Finnlando.

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista okazigis la prelegon "La katolika literaturo en Esperanto" de s-ro Henryk Paruzel, Pollando. Ĉeestis 300 homoj el 30 landoj.

Budhana Ligo Esperantista : prezidis s-ro Misiewicz, Pollando kaj ĉeestis 34 kongresanoj. Sekvis raporto pri la pasinta jaro kaj proponoj por intensigi la rilatojn inter Oriento kaj Okcidento. Oni decidis sendi telegramojn al prezidanto kaj vicprezidantoj de Budhana Esperantista Ligo kaj eldoni la ĵurnalon "La Budha Lumo".

Kristana Esperantista Ligo Internacia organizis prelegon de s-ro D. de Boer, Nederlando pri "La problemoj de la rasoj kaj la Biblio".

DISERVOJ

Protestanta diservo okazis en preĝejo de la Sankta Triunuo ĉe strato Kredytowa 8/4 kun ofico kaj prediko en Esperanto de pastro Fritz Renheim pri "La rikolto ja estas abunda".

Katolika diservo okazis en preĝejo de Nia Savinto ĉe placo Zbawiciela. Predikis esperantlingve sac. Henryk Paruzel pri "Esperantistoj de la Kredo kaj de la Amo".

Ekumenika diservo. En evangelia preĝejo de Sankta Triunuo ĉe strato Kredytowa. La meson celebris en Esperanto la ĉefepiskopo de la Malnova-Katolika Eklezio de Mariavitanoj s-ro Miĥaelo Johano Sitek. Post la diservo la celebranto predikis pri la temo "Unueco nur de Dio, unueco al ĉiuj homoj".

JUNULARA VESPERO


La Junulara Vespero okazis marde en la Balaj Salonejoj en la Kongresejo. Ĝi bonege sukcesis malgraŭ tio, ke samtempe estis Bulgara Vespero en la Teatro.

KONGRESO DE BLINDULOJ

En la kadro de la 44-a U.K. okazis ankaŭ la 29-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj. Al ĝi ni revenas en venonta numero.

GAZETARO KAJ RADIO

Gazetara Konferenco jam okazis vendrede la 31-an de julio antaŭ la Estraro de U.E.A. kaj L.K.K. en la hotelo "Grand" en Varsovio, kaj dum la kongresa semajno estis intervjuoj kun la prezidanto de U.E.A. kaj aliaj famkonataj personoj. La radio ĉiutage aŭdigis partojn de la kongreso kaj eldiroj de diversaj kongresanoj.



Medalo farita antaŭ la kongreso memore al la 100-jara naskiĝdato de d-ro L. L. Zamenhof.

Aliaj Aranĝoj kaj Gravaĵoj

BONVENSALUTO

En la stratoj de Varsovio kaj en la pola kaj en la esperanta lingvoj urbestro de Varsovio salutis la kongresanojn per jentekstaj afiŝoj :

Varsovianoj !

De la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto de kuranta jaro okazos en nia urbo la 44-a Universala Kongreso de Esperanto. Al la kongreso venos ĉirkaŭ 3000 reprezentantoj el diversaj landoj por esprimi sian konvinkon pri la neceso disvastigi la Internacian Lingvon, pri praveco de la ideo de ĝia kreinto — Zamenhof, kaj pri la grava rolo, kiun Esperanto ludas en la batalo por la paco, la komuna afero de ĉiuj homoj de bona volo.

La loĝantaro de Varsovio ĉiam staranta en la unuaj vicoj de pacbatalantoj, subtenas ĉiujn klopodojn por forigi militajn teruraĵojn kaj sendube ankaŭ dum la kongreso pruvos la veran komprenon por ĝiaj noblaj celoj. Ni faru ĉion por ke niaj gastoj havu kiel eble plej multajn agrablajn rememorojn pri ni kaj pri nia ĉefurbo.

*Zygmunt Dworakowski
prezidanto de la
Ĉefurba Nacia Konsilantaro en
Varsovio*

OFICIALA AKCEPTO

Grandstile la pola registaro, per la persono de la Vic-Ĉefministro Piotr Jaroszewicz, akceptis la tutan kongresanaron en la Balaj Salonegoj de la Kongresejo. Post bela parolado de la gastiganto kaj varma dankrespondo de la prezidanto de UEA, sekvis abunda regalo de plej delikataj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, elegante aranĝita sur senfinaj tablo-vicoj.

BANKEDO KAJ KONGRESA BALO

Lundon okazis la jubilea bankedo, en kiu partoprenis tre — fakte tro — multaj personoj, ĉar bedaŭrinde la restoracio ne povis servi ĉiujn. La kaŭzo estis, ke pro samtempa bankedo en la Kulturpalaco honore al la usona vic-prezidanto Nixon, la restoracio estis eksterordinare ŝarĝita.

Tuj post la bankedo okazis en la samaj salonoj, la Balaj Salonegoj de la Kongresejo, la Kongresa Balo kiu, kiel kutime, bonege sukcesis. Plenplenaj estis la salonoj, sed malgraŭ tio bulgara grupo trovis lokon por prezenti de tempo al tempo folklorajn dancojn, alte aprezatajn de la ĉeestantaro.

EKSKURSOJ

Sendube la ekskursoj ĉijare estis la ĝis nun plej interesaj. Menciita estas aliloke la vizito en Bjalis-

toko, sed evento estis ankaŭ la ekskurso al Zelazowa Wola, la naskiĝloko de Chopin, kie la partoprenantoj aŭskultis virtuozan Chopin-koncerton de la fama pianisto Imre Ungar.

La partoprenantoj de la 3-a ekskurso ĝuis folkloran prezentadon en la pentrinda regiono Łowicz. La apartenan popolmuzikon kaj kantadon surbendigis la Pola Radio por posta disaŭdigo.

GAZETARA SERVO

Dum la tuta jaro la Kongresa Gazetara Servo tre bone informis pri la plej gravaj okazaĵoj en la tuta Esperanto-movado. Bedaŭrinde ĝi ne same bone funkciis dum la kongreso — pro manko de kunlaborantoj. Por tiom ampleksa kongreso oni bezonas multajn helpantojn, kaj la malmultaj en Varsovio — malgraŭ tre streĉa laboro — ne kapablis publikigi la novaĵojn de tago al tago. Espereble venontjare en Bruselo multaj estos pretaj helpi — sed al la tre laboremaj deĵorantoj ĉijare tutkoran dankon.

LA KONGRESA LIBRO

La Kongreslibro ĉijare ne estis sendita al la kongresanoj antaŭ la kongreso, sed ĉiuj ricevis ĝin je alveno en la Akceptejo. Se oni konsideras, ke la impona listo de 2860 kongresanoj montras la staton je la 11-a de julio, estas klare ke la libro, kiu ampleksas entute 334 paĝojn, ne povis esti preta pli frue. Krom la kutimaj rubrikoj kaj multaj utilaj informoj, la libro enhavas antaŭ ĉio, pro la Jubilea Jaro, taŭge ilustritan artikolon pri D-ro Zamenhof, kiel ankaŭ la tutan tekston de la konata broŝuro "Biografiaj Informoj pri D-ro L. L. Zamenhof". Bedaŭrinde ne estas indikite ke la aŭtoro de tiu valora verketo estas R. Jossinet.

Novaĵo en la libro estas Seplingva Kongresfaka Terminareto, verkita de la Konstanta Kongresa Sekretario, S-ro G. C. Fighiera. Evidente ĝi estas rezulto de larĝa studo kaj ampleksa laboro kaj povos bone servi kiel bazo de pli detala terminaro, kiel dirite en la antaŭparolo.

Abundas informoj kaj artikoloj pri Pollando, famaj poloj, la urboj Varsovio kaj Krakovo, tiel ke oni ricevas sufiĉe kompletan bildon pri la lando kaj ĝia historio, nuksoŝele prezentitan. Ne mankas ankaŭ artikoloj pri la teatraĵoj "Pigmaliono" kaj "La friponaĵoj de Skapeno" kaj pri iliaj aŭtoroj. La kongreslibro enhavas, kiel kutime en la lastaj jaroj, grandan nombron da reklamoj kaj estas riĉe ilustrita. Iom naive impresas la tondaĵbildetoj en la adresaro, kiuj eble pli bone taŭgus en paperaĵoj de la Infankongreseto. Ankoraŭ ne solvita estas la problemo de la preseraroj, sed kiel tuto la libro estas grava dokumento de la Movado.



*La infanoj de la
Infankongreseto sur la scenejo
en diversnaciaj popolkostumoj.*

15-a INTERNACIA JUNULARA KUNVENO DE TEJO

okazinta de la 25 ĝis 31 de julio en Gdansk

En la ĉeesto de proksimume 250 partoprenantoj el 19 landoj deruligis la ampleksa programo de la 15-a Internacia Junulara Kunveno de TEJO, en Gdansk.

Tri komitataj kunsidoj kaj unu ĝenerala labor-kunsido pritraktis multajn aktualajn problemojn de la junularo kaj precipe tiujn de ilia organizo en fortan unuecan movadon, same kiel la metodojn de pli efika kaj grandskala disvastigo de Esperanto en la junularaj medioj.

Nova komitato estas elektita, kaj oni decidis la estontajn junularajn kunvenojn nomi Kongresoj.

Sed la junulara kunveno ne nur laboris, sed ankaŭ amuzis sin per ekskursoj kaj agrablaj vesperaj aranĝoj. Inter la ekskursoj estis elstare interesaj tuttaga ŝipveturo, vizito al la katedralo Oliva, al la urboj Sopot kaj Gdansk kaj aliaj.

Vespere la ĉeestantojn plejparte amuzis la junulara jaz-orkestro el Ljubljana (Jugoslavio). Estis organizita "Jugoslavia vespero" kun tre ampleksa kaj altnivela programo, kiu entuziasmigis la partoprenantojn. La Pola Radio surbendigis la tutan programon. Krom tio la orkestro estis invitita de la Pola Televido al Gdansk kaj ĝi publike partoprenis la televidan programon.

Estis ankaŭ organizita sukcesplena "Vespero de pola muziko".

La oratoran konkurson partoprenis tri junuloj, kiuj montris elstarajn kvalitojn ne nur de lingvosciado, sed de ideo riĉo kaj oratora kapablo. Ĝenerale estas laŭdinda la alta lingvonivelo elmontrita dum la kunestado de la esperantista junularo.

4-a INTERNACIA INFANA KONGRESETO

Dum la 44-a Universala Kongreso en Varsovio la kvaran fojon kongresis ankaŭ la plej junaj membroj de nia movado, t.e., esperantistoj inter 5 kaj 13 jaraj. Ĉi-foje partoprenis tiun aranĝon, lerte organizitan de S-ino M. Madurovicz, 40 infanoj el 5 landoj. Dum la kongresa semajno ili amikiĝis, kune ludis kaj kantis, en plena internacia harmonio.

La sidejo de la Infana Kongreseto estis la Supera Lernejo por Korpokulturo, ejo en kiu la infanoj ankaŭ loĝis. Pro tio, la infanoj estis iom for, nevideblaj por la komuna kongresano. Nur unufoje, mardon la 4-an de aŭgusto je la 14-a horo, la esperantistaj infanoj aranĝis programon por la plenkreskaj kongresanoj. Tiun aranĝon ĉeestis krom multaj infanamantaj esperantistoj ankaŭ la tuta Estraro de UEA, kaj aliaj eminentuloj. S-ino Irena Szczepańska-Walles, porinfana verkistino kaj gvidantino de infanaj elsendoj ĉe Radio Krakovo, bonvenigis nome de la infanoj la gastojn. La infanoj salutis la veteranon Stanisław Rudnicki, kaj al s-ino Holmes kaj s-ro Fighiera ili transdonis memorlibron je dispono de la venontaj kongresetoj. Post tio sekvis programo kiu konsistis el deklamoj, kantoj kaj dancoj, kiuj per siaj alta arta nivelo kaj perfekta harmonio ravis la gastojn, kaj elmontris la kapablojn de la infanoj kaj iliaj gvidantoj. Inter la kantoj elstaris pro sia arta aranĝo la pola popolkanto "Rivero Vistulo fluas tra Pollando", rearanĝita de s-ino Szczepańska-Walles.

La kongreseto estis denove plena sukceso kaj kuraĝigo por la estonto.

Solena Fermo de la Kongreso

Ĝi okazis en la Kongresa salonego sub prezido de prof. d-ro Canuto, kiu komencis sian paroladon jene:

Multaj estis la tagoj de la Kongreso, sed ili jam forpasis. Fakte la ĝiĉetoj funkciis jam antaŭ la Kongreso; do ĉi tiu Kongreso efektive daŭris pli longe ol aliaj... en tiu Varsovio, kiu akceptis nin en tiu ĉi grandega ejo, kie povis okazi ĉiuj aranĝoj sennombraj kaj, kie ni estis kvazaŭ hejme. Ankaŭ pro tio ŝajnis ke la tempo rapide forflugis. Komparante la nombron de la kongresanoj de la 44-a U.K. kun tiu de la ceteraj postmilitaj kongresoj ni konstatas ke ĝi superas ĉiujn aliajn. Tiu ĉi fakto parolas por si mem. La 44-a certe restos mejloŝtono en la historio de niaj kongresoj. Allogis ja Varsovio, allogis Pollando, kie naskiĝis Zamenhof, la lando kiu estas kvazaŭ la patrujo de ĉiuj esperantistoj. En la nomo de la kongresanoj mi povas diri, ke la aranĝoj de la Kongreso estis ege kontentigaj (aplaŭdego!).

Antaŭ ĉio la prezidanto dankis la LKK-on kun s-ro Rajska kiel prezidanto kaj la du vicprezidantojn prof. Henryk Kozłowski kaj Boleslaw Monkiewicz, kaj poste al G. C. Fighiera, KKS, sekretario Jan Zawada, kasisto Stanisław Rudnicki, Inĝ. Zamenhof, Zdzisław Czuba, inĝ. E. Fethke, d-ro A. Grebecki, Z. Laskowski, B. Nowiński, inĝ. T. Pleskaczyński, inĝ. K. Tymieński, J. Uśpieński, kaj al M. Gjivoje (Gazetara Servo), J. Walewska-Złotowska (artaj aranĝoj), S-ino M. Madurovicz kaj red. I. Szezepánska-Walles (Infana Kongreseto).

S-ro Ivo Rotkvic raportis pri la rezultoj de la ORATORA KONKURSO.

S-ro Norman Smith legis la raporton pri la BELARTA KONKURSO. Al la gajnintoj de ambaŭ konkursoj estis transdonitaj la diplomoj.

S-ro H. W. Holmes O.B.E., vic-prezidanto de U.E.A., transdonis la korajn salutojn de la ĝenerala sekretario de U.E.A., Prof. I. Lapenna, kun kiu li hieraŭ telefone parolis.

Plue, S-ro Holmes raportis pri la ĉefaj decidoj de la Komitato de U.E.A., kiu kunsidis sepfoje dum entute 19 horoj.

Membrino de la oficiala ĉeĥa delegacio kore dankis la Komitaton de U.E.A. kaj disdonis donacetojn el ĉeĥa fajenco nome de la ĉeĥa registaro.

Prof. Canuto legis la tekston de la Kongresa Rezolucio, kiun la Kongresanaro aklame akceptis. Plue la prezidanto proklamis la novan Estraron de UEA kaj esprimis dankon al la malnova. Li finis per la promeso ke li kaj la Komitato plulaboros por la bono de UEA kaj la bono de Esperanto (aplaŭdo).

S-ro Rajska nome de la LKK esprimis elkoran dankon al la Estraro de UEA pro la gvidado de la Kongreso, precipe al la prezidanto prof. Canuto, kaj al gesinjoroj Holmes, kiuj helpis en la organi-

zado de la U.K., precipe en la lasta monato. Koran dankon ni ŝuldas ankaŭ al la aŭtoritatoj, precipe al vic-ĉefministro Jaroszewicz.

Prof. Canuto proponis sendi al la Ministro specialan dankotelegramon (aplaŭde akceptita).

Estis aparte dankitaj ĉiuj varsoviaj esperantistoj, kiuj per ĉiutaga kunlaborado multe kontribuis al la sukcesigo de la Kongreso, precipe ankaŭ la pli ol 80-jara kasisto de L.K.K., S-ro Rudnicki.

Dezirinte grandan sukceson al la venonta U.K. en Bruselo, S-ro Rajska transdonis la tradician kongresan flagegon al la prezidanto de la 45-a Kongreso, S-ro Maurice Jaumotte.

S-ro Jaumotte, interbrakuminte kun S-ro Rajska, invitis la Kongreson al Bruselo, informis ke la Reĝo de la Belgioj akceptis la altan protektorecon de la 45-a U.K. "Nunjare", daŭrigis S-ro Jaumotte, "vi venis al lando vasta, al urbo, kiu multe suferis. Venontjare vin akceptos lando malgranda kun ĉefurbo, kiu pro feliĉa hazardo malmulte suferis. Estu kore bonvenaj ankaŭ en Bruselo!"

Post tio la prezidanto de U.E.A. deklaris la Kongreson fermita kaj finis per la vortoj: "Vivu la 45-a!"

Per leviĝo kaj kanto de la "Espero" finiĝis tiu ĉi lasta kunsido de la brile sukcesinta mondfesto esperantista en Varsovio. Provante doni kelkajn ĉefajn karakterizojn de ĉi tiu Kongreso ni povas diri ke ĝi estis manifestacio, ligita al 100-jara datreveno kaj postmilita plej multnombre vizitata de la orienteŭropaj kaj alikontinentaj landoj.



L.K.K. fermis siajn laborojn per adiaŭa vespermanĝo honore al la Konstanta Kongresa Sekretario. En la bildo S-ro Fighiera dankas al L.K.K. kaj al la Varsovia Filio pro la bela donaco ricevita (kompleto por skribotablo el marmoro kaj bronzo). Partoprenis en la manifestacio pli ol 60 deĵorantoj kaj L.K.K.-anoj.

FROSTAVALLEN KONTRIBUIS AL LA
FONDAJO ZAMENHOF

La lastan tagon de la Sveda Somera Semajno en Frostavallen (9-16 de aŭg.) Sinjoro Eizo Ito el Japanujo, kiu prelegis tie anstataŭ Prof. Kawasaki, donis al la sekretario de la I.O.K. la sumon de 100 svedaj kronoj por la Fondajo-Zamenhof. La saman vesperon la sekretario de la I.O.K. alvokis la partoprenantojn imiti tiun ekzemplon kaj memori la brile sukcesintan S.S.S. per iaŭplaĉaj donacoj al la Fondajo-Zamenhof. En kvin minutoj estis kolektitaj 395,97 svedaj kronoj, 110 danaj kronoj, 10 germanaj markoj kaj 1 angla pundo. En la ujo troviĝis unu monbileto de 100 danaj kronoj, alia de 50 svedaj kronoj, alia de 10 germanaj markoj, resp. de unu angla pundo. Se oni konsideras, ke pluraj ĉeestintoj jam pli frue donacis al la Fondajo-Zamenhof, la rezulto estas vere kontentiga. La tuta sumo estas transdonita al la C.O. de UEA por la Fondajo-Zamenhof kaj ĝi aperos en la regula rubriko pri la Fondajo-Zamenhof en la oficiala parto de la revuo.

Jam plurfoje estis faritaj alvokoj kontribui al tiu grava fondaĵo en la Zamenhof-Jaro. Ankoraŭ estas tempo helpi finance al kiel eble plej efika agado, tiel ke la tuta plano de la Zamenhof-Jaro povu komplete realigi. Efektive, absolute ĉiu esperantisto devus kontribui almenaŭ unu milonon de sia jara enspezo por tiu celo. La pli agemaj esperantistoj povus facile imiti la ekzemplon de Frostavallen kaj kolekti kontribuojn okaze de diversaj kunvenoj kaj festoj. Agu tuj kaj sendu viajn kontribuojn al la Centra Oficejo de U.E.A. aŭ al la ĉefdelegitoj kaj perantoj kun la indiko "por la Zamenhof-Fondaĵo".

La poŝtmarkkolektado. Statistiko la 1-an de aŭgusto: 2200 steloj. Represo de niaj alvokoj estas petata. Sendu daŭre vian kontribuon al P. Zacho, Randbølvej 4, Kopenhago.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1959

Stato je la 31-a de julio

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Hispanujo	1999	2643	132.21
2.	Belgujo	1480	1912	129.18
3.	Pollando	6635	8265	124.56
4.	Jugoslavio	5690	7060	124.07
5.	Finnlando	1935	2390	123.51
6.	Britujo	6093	6382	104.74
7.	Svislando	1950	2005	102.82
8.	Svedujo	6420	6510	101.40
9.	Usono	2816	2840	100.85
10.	Nederlando	5119	5058	98.81
11.	Francujo	7066	6850	96.94
12.	Norvegujo	1991	1885	94.68
13.	Italujo	3980	3260	81.91
14.	Danlando	2639	2110	79.95
15.	Germanujo	6951	5285	76.03
16.	Brazilo	8255	3156	38.23

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Japanujo	1150	2390	207.82
2.	Kanado	435	605	139.08
3.	Aŭstrujo	1360	1320	97.06
4.	Sudafriko	215	195	90.70

5.	Izraelo	255	230	90.20
6.	Portugalujo	615	550	89.43
7.	Novzelando	878	755	85.99
8.	Islando	270	230	85.19
9.	Urugvajo	325	255	78.46
10.	Aŭstralio	1280	1066	78.20
11.	Maroko	457	256	56.02
12.	Argentino	615	270	43.90

Ĉiu larĝe pasu 100% en la Zamenhof-Jaro!

PRECIZIGO DE LA ESTRARO DE U.E.A.
RILATE DEKLARACION DE S.A.T.

En Sennaciulo de julio 1959 aperis Deklaracio de S.A.T., en kiu troviĝas pluraj malĝustaĵoj. La Estraro de U.E.A. ne deziras polemiki kun S.A.T. Tamen, konsiderante la fakton, ke pluraj esperantistoj estas samtempe membroj de U.E.A. kaj de S.A.T., ĝi opinias, ke estas necese doni al la membraro jenan mallongan eksplikon:

Per sia letero de la 2-a de marto 1959 sinjoroj C. H. Despeyroux, Lucien Laurat kaj G. Waringhien, kiuj estas membroj de U.E.A. kaj de S.A.T., turnis sin al la ĝenerala sekretario de U.E.A. kun la propono, ke U.E.A. publikigu en "ESPERANTO" Deklaracion de S.A.T. La ĝenerala sekretario respondis per la letero de la 6-a de marto, ke li mem ne povas pri tio decidi, sed ke li prezentos la proponon al la Estraro de U.E.A. Poste, okaze de la vizito de la prezidanto kaj ĝenerala sekretario al la Sekretariato de UNESKO en Parizo, estis eble okazigi mallongan kunvenon inter la prezidanto kaj ĝenerala sekretario, unuflanke, kaj sinjoroj Bannier, Waringhien kaj Laurat, aliflanke, en la ĉeesto de komitatano S-ro Jean Thierry. Montriĝis ke la proponita Deklaracio de S.A.T. ne estas publikigebla en la oficiala organo de U.E.A., ĉar ĝi entenas malĝustaĵojn. Sekve, Prof. Waringhien sugestis, ke li mem faros projekton de alia Deklaracio, kiun li sendos al S.A.T. kaj al U.E.A. Tiu dua teksto estis sendita al la Estraro de U.E.A., kiu pridiskutis ĝin, faris 2-3 malgravajn ŝanĝetojn, sed opiniis ke estas necese aldoni plian paragrafon, kiel sesan alineon. En la kvina alineo, nome, estis dirite pri S.A.T. ke "politike, ĝi staras sur la bazo de la klasbatalo, sed, trans tiu bazo, deklaras sin neŭtrala rilate al la diversaj laboristaj partioj kaj filozofiaj sistemoj". La Estraro de U.E.A. deziris ke post tiu alineo sekvu plia, kiu klare montrus la celojn de la du organizaĵoj. Tiu proponita alineo tekstis:

"U.E.A., sekve, celas la ĝeneralan enkondukon de la Internacia Lingvo en ĉiujn internaciajn rilatojn kaj kiel tia ĝi reprezentas la Esperanto-Movadon en la senco de la Bulonja-Deklaracio, dum S.A.T. utiligas la lingvon por specialaj celoj simile al aliaj fakaj kaj specialigitaj organizaĵoj uzantaj Esperanton".

La ĝenerala sekretario prezentis tiun novan tekston al S.A.T., kiu per sia letero de la 30-a de aprilo informis, ke ĝi ne povas akcepti la aldonitan alineon 6. En la letero estis sugestite, ke la Estraro de U.E.A. rekonsideru la aferon. La 4-an de majo la ĝenerala sekretario respondis al S.A.T., ke ne havas sencon prezenti al la Estraro de U.E.A. denove la saman aferon, ĉar la decido estas farita kaj "la opinio de ĉiuj estraranoj estas respigitita precize en la paragrafo 6". En tiaj kondiĉoj — daŭrigis la ĝenerala sekretario — "estas plej bone, ke ni ne faru iun ajn deklaron. Tio nur elvokus superflujajn diskutojn, kio, precipe nun en la Zamenhof-Jaro, estus malutila por nia komuna afero."

Ne estas, do, ĝusta la aserto en Sennaciulo, ke "S-ro Lapenna rifuzis repreni tiun paragrafon", ĉar la ĝenerala sekretario povis nek repreni nek ne repreni ĝin. Li agis konforme al la unuanima decido de la Estraro. Ankaŭ ne estas ĝusta la aserto en Sennaciulo, ke S.A.T.

repondis al tiu letero. Nenia respondo estas ricevita ĉe la organoj de U.E.A. Sekve, ankaŭ la diro, entenita en la kvazaŭa respondo, "ke tia pretendo al hegemonio super la esperantistaro ne estas akceptebla" estas la unuan fojon legita nur en Sennaciulo de julio.

Efektive, la Estraro de U.E.A. opinias, ke la menciita paragrafo 6 estas konforma al la fakta stato. Laŭ la Statuto kaj sia tuta agado, U.E.A. celas, interalie, "dismvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto" kaj ĝi estas "neŭtrala rilate al nacieco, raso, religio, politiko kaj sociaj problemoj". Laŭ la Deklaracio de Bulonjo, "la Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa....." kaj "ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia esperantisto ligas kun la Esperantismo estas lia afero pure privata, por kiu la Esperantismo ne respondas". Sekve, ne povas esti dubo, ke U.E.A. reprezentas la Esperanto-Movadon kiel tian en la senco de la Bulonja Deklaracio.

Aliflanke, S.A.T. neniam neis, ke ĝi staras "sur la bazo de la klasbatalo". Tio estas ĝia rajto. Estas ankaŭ ĝia rajto utiligi Esperanton por siaj specialaj celoj, same kiel tion faras diversaj aliaj organizaĵoj. Tamen, estas sendube, ke, ĝuste tial S.A.T. ne povas reprezenti la Esperantisman en la senco de la Bulonja Deklaracio. La celoj kaj praktika agado de S.A.T. estas precize tio, kion la Bulonja Deklaracio nomas "ĉiu alia ideo aŭ espero.... por kiu la Esperantismo ne respondas".

La Estraro de U.E.A. esperas, ke per tiu ĉi precizigo tiu ĉi afero estas finita. La membraro mem, precipe tiu parto, kiu apartenas ankaŭ al S.A.T., prijuĝu mem la korektecon de la starpunkto de la Estraro.

En Varsovio, la 2-an de aŭgusto 1959.
La Estraro

RADIO

Ciujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier,
29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por tempoj kaj ondlongoj vidu la julian numeron.

Radio Roma. 1-IX, Tra la literaturo; 4-IX, Giuseppe Giusta, okaze de la 150-a naskiĝa datreveno; 8-IX, Italujo kaj la filatelo; 11-IX, Leterkesto kaj bibliografio; 15-IX, Italaj kanzonoj en Esperanto; 18-IX, Novaĵoj el Italujo; 22-IX, La Itala Ruĝa Kruco, okaze de la centa datreveno de la fondo; 25-IX, Itala pentristo Raffaello; 29-IX, Operarioj kantataj en Esperanto de soprano Angela Rositani; Krome, ĉiun merkredon, kuriero de Esperanto.

Radio Zagreb. 3-IX, Pri la junularaj aranĝoj; 10-IX, Radio-novelo; 17-IX, Mozaiko-kuriozaĵoj; 24-IX, Primovadaj novaĵoj kaj respondoj al la korespondantoj; 1-X, Honore al la Tago de Mondpaco; 8-X, Pri la jugoslavia popola muziko; 15-X, "Eta lando inter la mondoj".

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM-2 NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

N-ro 318

La 1-an de aŭgusto 1959

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de julio kaj ankaŭ por komparo je la fino de julio 1958:

	1958	1959
Individuaj membroj	12923	15626
MJ	719	805
MA	4695	5141
MS	519	506
Pat.	5	7
DM	305	335
HM	46	45
JMJ	14	26
JMA	93	164
	<u>6396</u>	<u>7029</u>
	19319	22655

DELEGITTOJ

Aŭstralio
Mount Waverly (Victoria) D : vakas.

Aŭstrujo
Linz (Ober-Österr.) FD (abelkulturo) : vakas.

Belgujo
Antwerpen FD (turismo) : vakas.

Brazilo

Guajará-Mirim (Rondônia) D : S-ro Roskildes Pereira de Mélo, ŝtato-ficisto, Avenida 12 de Outubro 223.

Rio de Janeiro (Distrito Federal) FD (literaturo) : S-ro Henerik Kocher, instruisto, Rua Castro Tavares, 32 (Manguinhos).

Britujo

Canterbury (Kent) FD (pri pacaj aferoj) : S-ro Alfred George Tucker, lingva eks-profesoro, Birchcroft, Pilgrims' Way, Harbledown.

Sowerby Bridge (Yorkshire) D : F-ino Jessie Haigh, robistino, 19 Steps Lane.

Ĉeĥoslovakujo

Bratislava (Slovakio) D : F-ino Magda Dr. Šaturova, redaktorino, Csl. Armády 40.

Brno (Morava) FD (difektoskopio) : S-ro Arnošt Balaš, estro de la difektoskopio centro, Mošnova 17.

Danlando

Herning (Jylland) VD : S-ro Hans Peter Jespersen, fabrikanto, Bryggergade 3.

FD (urbaj aferoj) : la VD.

Finnlando

Korso (Uudenmaan lääni) D : S-ro Arnold Horsmala, inspektoro, Vierumäentie 24.

FD (liberkristana) : la D.

Francujo

Bischwiller (Bas-Rhin) FD (muziko) : vakas.

Blaincourt par Brienne le Château (Aube) D : vakas.

FD (religiaj aferoj) : vakas.

Briançon (Hautes-Alpes) D : S-ro Jean Duthilleul, advokato, 7 rue Commandant Carlhann.

FD (ŝak-sporto) : la D.

Cholet (Maine et Loire) D : vakas.

Foix (Ariege) D : vakas.

Lyon (Rhône) D : vakas.

Neussargues (Cantal) D : S-ro Guy Tater, arbargardisto.

Germanujo

(14b) Gechingen (Baden-Württemberg) D : S-ro Adolf Burkhardt, pastro.

FD (protestantismo) : la D.

(22c) Köln (Rheinland) D : S-ino Maria Gernsbacher, Bachemerstr. 276.

Mannheim (Baden-Württemberg) JD : F-ino Waltraud Schmidt, komerca oficistino, Rheinaustr. 30.

Mühlacker (Württ.) D : vakas.

(20a) Unterlüss (Niedersachsen) D : S-ro Max Walfher, teknika oficisto, Süd-torstr. 1.

FD (magio) : la D.

Hispanujo

Palma de Mallorca (Balears) VD: S-ro Mariano Jaquotot, komerca-kalkulisto, Str. Miguel Marqués 72 - la - 2a.

Hungarlando

Budapest (XI-kerület) FD (kinematografio-amatoro): S-ro G. Árpád Pölöskey, nat. scienca espl./jurnalisto, Puskás tér 13.

Orosháza (Békés-departemento) D: D-ro Bálint Szemenyei, jugisto, Huba-str. 38.

FD (juro): la D.

Italujo

Favaro Veneto (Venezia) D: S-ro Giovanni Della Savia, pensiita oficisto, Via Monte Focobon 8.

Firenze (Toscana) FD (edukado kaj instruado): S-ro Pietro Brovelli, instruisto, Borgo S. Frediano no. 9.

Japanujo

Moriyama-si (Aiti-ken) D: S-ro Kotohiko Macubara, pastro, Tenmori, Kozoji, Aičiken.

Kanaĉo

Lachute (Quebec) D: S-ro George Novotny, inĝeniero, 681 Main Street.

Nederlando

Den Haag (Zuid-Holland) D: S-ro Henri Kervers, statoficisto, van Slingelandtstraat 22.

Hilversum (Noord-Holland) VD: S-ro J. H. Morreau, revizoro kaj impostkonsilisto, Tesselschadelaan 10.

Rotterdam (Zuid-Holland) FD (poŝto): S-ro J. M. J. Driesen, pensiita fakĉefo PTT, Sam. Mullerstraat 7a.

Nov-Zelando

Herald Island (Auckland) D: S-ro H. E. Facer.

Palmerston (Manawatu) D: vakas.

Pollando

Milanówek (Polska) D: S-ro Andrzej Pettyn, studento, ul. Kościuszki 24.

Svedujo

Malmö (Skåne) JD: S-ro Sven Bertil Edvard Nilsson, kelnero, Bodekullsgatan 31a.

Sparsör (Vättergötland) D: S-ro Bengt Markling, komercisto, Villa Solhamra.

Usono

Nyaek (New York) D: S-ro Lee Stern, intendanto, ĉe Fellowship of Reconciliation.

FD (pacifismo): la D.

Silview (Delaware) D: vakas.

Wilmington 4 (Delaware) D: S-ro Gilbert Nickel, eks-lernejestro kaj kolegia profesoro, 204 Harding Avenue.

Venezuelo

Caracas (Distrito Federal) FD (muziko): S-ro Antonio Lauro, komponisto, Apartado 6679.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Civinelli, S-ro Alejandro, Buenos Aires, Argentino.

McNamara, S-ro M. L., Auckland, Nov-Zelando.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1959

429 Gomez, F-ino Angèle, Meknes, Maroko.

430 Vidal, S-ro J., Menkes, Maroko.

431 Knol, D-ro G. T., Coevorden, Nederlando.

432 Laverman, F-ino A. A., Leeuwarden, Nederlando.

433 Nesje, S-ro Hans, Aalesund, Norvegujo.

434 Thorvaldsen, S-ino E., Asker, Norvegujo.

435 Sales, S-ro Alfredo L., Leiria, Portugalujo.

436 Dickson, S-ino Margaret E., Cape Town, Sud-Afriko.

437 Akerberg, S-ro B., Hägersten, Svedujo.

438 Eriksson, S-ro Bernhard, Stockholm, Svedujo.

439 Gustafson, S-ro Nils, Hällabrottet, Svedujo.

440 Hedgren, S-ro Nils, Hägersten, Svedujo.

441 Larsson, S-ro Carl, Västerås, Svedujo.

442 Linnander, S-ro Siri, Stockholm, Svedujo.

443 Karlsson, F-ino Hilda, Klippan, Svedujo.

444 Sjöberg, S-ro Helge, Gnosjö, Svedujo.

445 Söderlund, S-ro B., Kumla, Svedujo.

446 Solin, S-ro Paul, San Diego, Usono.

447 Wanzer, S-ro W. O., Long Beach, Usono.

448 Harry, S-ro Ralph, Armadale, Aŭstralio.

449 Coutinho, D-ro Luiz de Azeredo, Belo Horizonte, Brazilo.

450 Schembri, F-ino J., Belo Horizonte, Brazilo.

451 Vianna, D-ro João, Belo Horizonte, Brazilo.

452 Vianna, S-ro Lincoln Martins, Belo Horizonte, Brazilo.

453 Zuhlke, S-ino Clara Alvina J., Rio de Janeiro, Brazilo.

454 Hoyle, S-ro James, Manchester, Britujo.

455 Morton, F-ino H. R., London, Britujo.

456 Shaw, S-ro Francis William, Wistaston, Britujo.

457 Schleicher, S-ro Ib, København, Danlando.

458 Genet, S-ro A., Le Pellerin, Francujo.

459 Keller, S-ro Ad, La Celle-St.-Cloud, Francujo.

460 Dreger, S-ro Alexander, Recklinghausen, Germanujo.

461 Oeste, S-ro Wilhelm Th., Köln, Germanujo.

462 Wetterstein, S-ro August, Welper, Germanujo.

463 Pacelli, Prof. Giuseppe, Pisa, Italujo.

464 Srebrnič, S-ro Jože, Nova Gorica, Jugoslavio.

465 Gorbatoff, S-ino A., Oujda, Maroko.

466 Allan, S-ro James T., Wellington, Nov-Zelando.

467 Bernhardt, S-ro Werner, Windhoek, Sud-okcidenta Afriko.

468 Peter-Ruetschi, S-ino Tina, Zürich, Svislando.

469 Buchheim, S-ro Walter A., Denver, Usono.

470 Pease, S-ro R. M., Jersey City, Usono.

471 Grahovac, S-ro Ilja, Melbourne, Aŭstralio.

472 Santos, S-ro Nelzito, Petrolina, Brazilo.

473 Ford, F-ino E., London, Britujo.

FONDAJO ZAMENHOF

Antaŭa sumo: 14.918.51 gld.
S-ino Blanca Villafaña 5.70 gld., Argentino; Aŭstralio Esperanto Asocio 80.— gld., Pastro Sigismund 8.— gld., Aŭstralio; Peter kaj Grete Angerer 5.— gld., Hedwig Kaes 2.91 gld., Aŭstrujo; M. van Aelst 6.35 gld., Flandrema Grupo 18.60 gld., Belgujo. Luis de Azeredo de Coutinho 13.55 gld., Antonio José Vaz 9.64 gld., Brazilo, J. Sykes 10.63 gld., Lancashire Fed. 55.81 gld., Dvid G. Hill 5.31 gld., H. Yates 5.31 gld., Yorkshire Fed. 53.15 gld., G. J. Vox 29.23 gld., R. Rossetti 3.19 gld., Societo de West Hartlepool 10.63 gld., Societo de Bradford 53.15 gld., K. McLennan 10.63 gld., Ges. Laurie 21.26 gld., E. P. Crabtree 10.63 gld., Britujo; Njanasatta-Thero 7.11 gld., Cejlono, C. J. Jahn 8.20 gld., Knud Weile 9.65 gld., Danlando; H. S. Silvonon 5.20 gld., S. Joensunano 3.76 gld., Finnlando; N. Epstein 68.14 gld., Ohana Bension 9.24 gld., F. Arriue 3.25 gld., N.N. 9.09 gld., S-ino Monteganrand 3.85 gld., F. Garrigue 38.50 gld., Francujo; D-ro Fritz Besold 6.32 gld., F-ino Elise Jacobs 9.02 gld., Ernst Kind 6.40 gld., A. Mosch 5.07 gld., Friedrich Weiss 9.02 gld., Germanujo; D-ro Daniel Llorens 7.20 gld., Angel Foguerola 4.32 gld., Prelego de Joŝiko Kajino 14.76 gld., Antonio Criach 1.44 gld., E. Neiger 9.72 gld., Gruppo Esp. Udinese 30.— gld., Italujo; Prof. Ryozi Ura 10.56 gld., T. Hagiwara 10.56 gld., A. Hanamura 21.17 gld., Y. H. Ishiguro 5.31 gld. S. Kato 10.56 gld., J. Kitahara 10.56 gld., T. Komori 5.31 gld., M. Nagaoka 5.31 gld., Negiŝi-Masajoŝi 5.31 gld., S. Nishi 10.56 gld., K. Oosaka 21.17 gld., T. Sasaki 10.56 gld., H. Shinoda 31.56 gld., H. Takeda 10.56 gld., H. Takei 5.31 gld., M. Sugita 10.56 gld., K. Ueda 52.56 gld., I. Yamazoe 10.56 gld. I. Yamaga 18.99 gld., K. Morihara 10.56 gld., T. Takahaŝi 5.31 gld., Japanujo; Prof. J. Vrančić 3.— gld., Jugoslavio; R. Randriamanantena 7.70 gld., G. Randrianarisoa 7.70 gld., F. Rasoanaivo 3.85 gld., Madagaskaro; N.N. en V. 25.— gld., K. Ruig 2.31 gld., N.N. en H. 30.— gld., H. H. v.d. B. 3.— gld., Inĝ. J. R. G. Isbrucker 10.— gld., D. M. Ponti 3.75 gld., "Busumanō" 2.50 gld., Nederlando; S-ino E. Astin 5.31 gld., Nov-Zelando, Karl Bengtsson 7.29 gld., Svedujo. I.F.E.F. 60.— gld.

Entute 16.060,77 gld. je 1.8.59.

Donacu unu milonon — aŭ pli! — de viaj jaraj enspezoj por tiu ĉi gravega celo!

DONACIOJ AL A.P.O.

S-ro N. Hanson, Britujo 21.26 gld.; S-ro P. Petit, 42.35 gld.; S-ro A. Ribot 7.70 gld.; S-ro P. Marly 15.40; S-ro A. Ploussou 7.70 gld.; S-ro N. Epstein 7.70 gld.; S-ro R. Martin 3.85 gld.; S-ro F. Charlet 4.62 gld.; S-ro H. Jullien 15.40 gld.; S-ro E. Tison 7.70 gld.; S-ro P. Poly 3.85 gld.; D-ro J. Tortel 26.95 gld.; S-ro J. Doyelle 1.92 gld.; S-ro Tribouillard 4.23 gld.; S-ro M. Fabert 3.85 gld.; S-ro M. Moindrot 1.54 gld.; S-ro E. Pizard 1.50 gld.; S-ro P. Petit 77.— gld.; S-ro J. Guillaume 7.70 gld., Francujo, N.N. en V., Nederlando 5.— gld., N.N. en R., Nederlando 5.— gld.

DONACIOJ AL ĜENERALA KASO

S-ro H. Yates, Britujo 2.66 gld.; S-ro Gustavo Bonvecchiato, Italujo 5.50 gld.; N.N. en R., Nederlando 5.— gld.; F-ino Agda Olsson, Svedujo 109.29 gld.; S-ino Klara Justis, Usono 3.76 gld.; S-ro Roland Barta, Usono 6.45 gld.

Al ĉiuj donacintoj tre koran dankon!
M. H. Vermaas, Direktorino C.O.

ANONCETOJ

Londona gastejo, agrabla loĝloko. Lito kaj matenmanĝo po 14 ŝ. 6 p. por ĉiu nokto. Prezoj malaltiĝas laŭ loĝdaŭro. Oni parolas Esperanton kaj la francan. D. Bytheway, "Flat Four", 1, Warrington Crescent, LONDON W. 9, Britujo. Telefono CUNningham 4487.

Katolika Esperantisto! Ĉu vi jam estas membro de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantisto (IKUE)? Jar-kotizo ned. guld. 6.— = 24 steloj aŭ egalvaloro. Membroj ricevas la monatan 20-paĝan Esperanto-revuon ESPE-RO KATOLIKA. Informojn donas la Administracio de IKUE: Frederikstraat 2, Dordrecht, Nederlando.

Ibra Radio, kiu sendas el Tanger, Afriko, havas Esperantan programon la lastan mardon de ĉiu monato je 20.15 horo mezeŭropa tempo. Ondlongoj 32.5 m, 26.1 m kaj 20.2 m. Ibra sendas en multaj lingvoj. Aŭskultu kaj skribu en Esperanto al Ibra Radio, Stockholm 1, Svedujo.

Ĉu troviĝas inter la lertaj Esp-istoj anglalingvanoj kiu scipovas la "Kristan Sciencon" kaj eble interesiĝus pri eldonado de Esp. traduko de ĝia instru-libro? Jam ekzistas unu traduko aprobita de plej eminentaj Esp-istoj. Interesatoj bonvolu kontakti: John F. Clewe, 1234 West 40th Place, Los Angeles 37, California, U.S.A.

Esperanto-Civito, 14 B Castle Avenue, Dover, Britujo. Fondaĵo staras je 7 pundoj.

Urugvajo. D-ro R. Zeballos Morales, Fray Marcos, serĉas la preĝon "Patro Nia" en plej div. lingvoj, dialektoj kaj variantoj. Rekompencos laŭdezire. Anonco ĉiam valida!

Specimenajn botelojn (5-100 gr.) etike-

dajn interŝanĝas aŭ aĉetas S-ro José Pazos, José Osorio 1228, Montevideo, Urugvajo.

Haltu! Haltu! Kontraŭ unu internacia respondkuponon ni sendas al vi la 16-paĝan riĉenhavan kaj bele ilustritan belartan numeron de la junulargazeto "Birdo". Adreso: Birdo, Poŝtfolio 93, Den Haag, Nederlando.

Profesorino, kandidato de pedagogiaj sciencoj deziras serioze interkorespondi kun gesamfakanoj el ĉiuj landoj pri instruado de botaniko kaj zoologio en mezgradaj lernejoj. Por sciencaj studoj estas urĝe bezonataj specimenoj de nacilingvaj lernolibroj pri botaniko kaj zoologio. Rekompenco nepre kaj tuja laŭdezire per uzbek- aŭ ruslingvaj libroj, revuoj, ilustritaj albumoj, bildkartoj, poŝtmarkoj ktp. Adreso: Belskaja Heleno, ul, Kafanova 49, Taŝkent, Uzbekistano, USSR.

Esperantisto el Niŝ deziras korespondi kun ĉiuj landoj per leteroj kaj PI pri ĉiuj temoj. Ankaŭ deziras interŝanĝi PI. Adreso: Dragan Arsić, hidrologo, Rudnička 22b, Niŝ, Jugoslavio.

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn de ĉiuj landoj J. L. Pinto da Luz, Rua Pinto Guedes 155, Rio de Janeiro, Brazilo.

Liberpensuloj, humanistoj. Brita Esperanto-Humanistaro volas enrilatiĝi kun sampensuloj ĉiulande. Skribu, kun rpk., unue al la Sekr., G. L. Dickinson, 21 Gribble Road, Liverpool 10, Britujo.

Meksikio, Praa kaj nuna lando! Mi sendas du interesajn poŝtkartoj aŭ dek uzitajn poŝtmarkojn kontraŭ egalvaloro el iu ajn angulo de la terglobo. Ing. Figueroa, Bolivar 874-6, Mexico 13 D.F. **Por doni novan impulson** al nia grupo, bonvolu sendi amase el ĉiuj mondpartoj, poŝtkartojn, turismajn prospektojn, reklamilojn, gazetojn, propagandilojn, ktp. Nepre dankos. Esperantista grupo, 13, Rue de Mulhouse, Valence (Drôme), Francujo. Represo petata.

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun seriozaj kolektantoj tutmonde, kvanto kontraŭ kvanto, aŭ laŭeble kataloge. Respondo garantiita. S-ro Reindl Tomáš, Výkup, závod Vodňany, Ĉeĥoslovakio.

Brazila esperantisto deziras korespondi tutmondaj gesamideanoj, interŝanĝi poŝtkartojn, poŝtmarkojn. Skribu tuj al: Carlos Evandro Teixeira, Delegacia Fiscal Tesouro Nacional, Belo Horizonte, Minas Gerais, Brazilo.

Pri denaska esperantisteco, hejma uzado de Esperanto kaj aliaj temoj volas korespondi kun spertaj esperantistoj (eventuale ankaŭ interŝanĝi sonbendojn). José Dias Pinto -Caixa Postal 834, Santo André, São Paulo, Brazilo.

Maristo volus korespondi pri diversaj temoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn en kompletaj serioj. Skribu al: S-ro Aleksy Kaźmierczak, Gdynia 17, Blok 2/I m. 10, Pollando.

Adresŝanĝo. Familio Delgado, 58 Albert Road, Tamworth, Staffs, Britujo, antaŭe ĉe 21 West Str, Kettlebrook.

Deziras korespondi kun sinceraj virseksaj amikoj en ĉiuj partoj de la mondo. Estas 38-jaraĝa. Respondo garantiata S-ro Paul Weyda, Bürgermeister a. D., Auricher Str. 47/Eg., Stuttgart-Rot, Germanujo.

Klubo Esperantista de Falun kore esprimas sian dankon al ĉiuj, kiuj afable kontribuis al nia ekspozicio per alsendo de materialo. Pro la neatendite granda nombro da alvenajtoj ni decidis forlotumi tri abonojn anstataŭ du. La fortuna favoris la ĉi-sube nomitajn sendintojn: S-roj Kurt Schönrich, Wiesbaden, Josefo Prochazka, Stavkov u Brno, J. J. Sturzenegger, Zürich.

Bonvolu sendi artikolojn pri ĉiuj temoj (politiko, tekniko, populara scienco, historio, geografio ktp.) al Kosmopolita Klubo, Benny Vemmer, Rossinisvej 4, Kopenhago S.V., Danlando.

Esperanto parolata: internacia adresaro da hoteloj, butikoj, informoj, ktp. 3 rpk. al S-ro Réotot, 162 bulvarado A. Briand, Montreuil (Seine) aŭ 140F, poŝtkonto: Paris 1042-07.

21-jarulo deziras korespondi tutmonde. S-ro Ingemar Lagee, Angnäs, Vånga, Svedujo.

Serioze interŝanĝos tutmonde poŝtmarkojn en kompletaj serioj kontraŭ kompletaj serioj polaj. Skribu al: Zdzisław Wiszczak, Kamienna Gora. Al Wojsko, Polskiego 11 m. 2. woj. Wrocław, Pollando.

Se vi deziras korespondi kun brazilanoj el Minas Gerais (vidu mapon), bonvole sendu al ni la jenajn informojn: via nomo, sekso, aĝo, kompleta adreso, profesio, dezirata korespondanto (sekso, aĝo) kaj preferataj temoj. Nepre respondo. Esperanto-Societo de Minas Gerais, Caixa Postal 801, Belo Horizonte M.G., Brazilo.

Intersteno Trimonata kun suplementoj, propraj aŭ aliulaj (formato cm. 19 × 14) Organo por enkonduko de simpla skribo, reformo de angla kaj franca ortografioj ktp. multlingva. Abono 4 rpk. aŭ egalvaloro: el Oriento 200 stampitaj pm: el Italujo kaj Francujo 240 liroj. Abonantoj rajtas kunlabori kaj ricevi la gvidilon 4a eldono aŭ la gvidilon por la nacia koresponda skribo, sed ili devas pruvi, ke ili lernis la enhavon de suplemento de n. 10, havebla senpage. Specimeno kontraŭ specimeno de esperanta aŭ nacia gazeto aŭ ĵurnalo. C. Daglio — Litta Parodi — Alessandria (Italujo).

Por montri la valoron de Esperanto bonvolu sendi kiel eble plej multajn poŝtmarkojn uzitajn de via lando al: The Stamp Club, Secondary School, Hornsea, Yorkshire, Britujo. La lernejestro.

Esperanto Societo Frankfurt/Main petas Esperantistojn vizitontajn Frankfurt Novembro/Decembro partopreni publikan Zamenhofan solenon. Anoncu vin jam nun je Wilhelm Kistenbrügger, Königstein s. (Okc. Germanujo) Hainerbergweg 10.

Ne-membroj de U.E.A.

ricevintaj tiun ĉi numeron konatiĝe

estas varme invitataj al aliĝo, ĉu kiel Membro kun Jarlibro (ĉ. 700 paĝoj entute; kotizo "MJ" 6,25 gld aŭ egalvaloro), aŭ kiel Membro kun Jarlibro kaj revuo "Esperanto" (ĉ. 240 grandaj paĝoj entute; kotizo "MA" 12,50 gld aŭ egalvaloro).

Ĉiu individua membro de U.E.A. havas rajton uzi la delegitan reton kaj ĉiujn aliajn servojn de U.E.A., ĝuas rabaton je la kotizoj de la Universalaj Kongresoj kaj havas sennombrajn pliajn avantaĝojn. La Jarlibro de U.E.A. enhavas la plej riĉan dokumentan materialon pri la tutmonda Esperanto-Movado kaj ĉiuj ĝiaj aspektoj. Per la revuo "Esperanto" vi restas ĝisdate informata pri la stato de la Movado sur ĉiuj kampoj.

Ne hezitu! Petu pliajn informojn ĉe la Centra Oficejo de U.E.A., Eendrachtsweg 7, Rotterdam, Nederlando.

Favoraj kondiĉoj je aliĝo kiel MJ 1959 kaj MA 1960 samtempe.

Aŭtunaj Feriaj E-Kursoj

Vejlje, Danlando

Ilin ni invitas vin ĉeesti 18.-25.10. en La sporta Altlernejo de Vejle.

Ĝiaj arbaroj portas tiam sian plej belan kaj plej multkoloran aŭtunan veston. Petu detalan programon ĉe

L. Friis,
Ingemannsvej 9,
Aabyhøj, Danlando.

la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de
Prof. G. Waringhien

kun kunlaborado de la plej famaj verkistoj
aperas ĉiun duan monaton
32/40 paĝa - - poŝformato jare fr. fr. 400.- aŭ
egalvaloro

Ricevas la abonojn:

En Francujo: R. Fiquet, Poŝta konto 2259-98
Marseille

Alilande: Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj landaj Perantoj
de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio:
7, Av. Léon-Gourdaul
Choisy-le Roi (Seine) Francujo.

Administracio:
5. Bd. Stalingrad
Nice (A-M)

Atentu!!

Atentu!!

Grava Konkurso!

Ĉiu individua membro povos ĝin partopreni!

Tiuj kvin personoj, kiuj varbos plej multajn reklamojn por Jarlibro 1960, gajnos libropremion je valoro de 25.— gld (100 steloj), kondiĉe ke la tuto de la varbitaj reklamoj ampleksu minimume po 4 tutaj paĝoj.

Kondiĉo:

La reklamoj devos esti atingintaj la Centran Oficejon plej malfrue la 15-an de novembro 1959. Reklamoj alvenintaj post tiu dato eble povos eniri ankoraŭ la Jarlibron, sed ne plu validos por la konkurso.

Perantoj aŭ ĉefdelegitoj, kiuj peros al ni la reklamojn, nepre indiku la nomon de la varbinto!

Ne maltrafu ĉi tiun bonan okazon pliriĉigi vian bibliotekon. Tuj ekagu kaj duobligu vian varbenergion!

NOTU BONE! La tarifo por tutpaĝa reklamo por 1960 estas fiksita en ned. valuto je 80.— gld. Ĝi egalas al: 160 angl. ŝil., 550 aŭstr. ŝil., 1100 belg.fr., 160 dan.kr., 90 germ.m., 16000 it. liroj, 160 norv.kr., 110 sved.kr., 90 svis.fr., 22 us.dol.

Pro grave altiĝintaj kostoj de papero kaj presado, ĉi tiu altigo estis neevitebla, sed ankoraŭ nia tarifo estas ege malalta el komerca vidpunkto. Nur per nia Jarlibro hoteloj, turistoficejoj, komercaj entreprenoj ktp. povas atingi 80 landojn samtempe kaj per unu lingvo!

Jus aperinta franclingve,

Le Docteur Esperanto

verkita de Maria ZIOLKOWSKA
vivo kaj verko de L. L. ZAMENHOF

broŝ.: 720 fr. fr. - Bind. kun oraj titoloj: 1.480 fr.fr.

Nepre havinda verko!

DISKO mikrokanele 45 t/m por akiri perfektan prononcadon de Esperanto: 420 fr. fr.

EDITIONS FRANÇAISES d'ESPERANTO,
Marmande, Francujo.

Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam